5-a Jaro. N-o 246 APERAS  SEMAJNE 20. Junio 1929

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris-12e Gvidanto: E. Lanti | SIDEJO de Plenum-Komitato de SAT 23, rue Boyer, Paris-20e | ADMINISTREJO: Colmstr. 1, Leipzig O 27 Administranto: R. Lerchner

LA FILOZOFIO DE L' MARKSISMO

La marksismo havas kiel filozofian bazon la materialismon. Hodiaŭ estas bonmode en burĝaj rondoj deklari la materialisman filozofion arkaika. Kelkaj fizikistoj eĉ, subtenataj cetere de metafizikistoj, revas pri senmateria fiziko. Ŝajne ili volas revenĝi sin kontraŭ la materialistoj, kiuj provas realigi psikologion senaniman, bazitan nur sur faktoj de fizika speco, facile observeblaj kaj konstateblaj.

Ni ne pensas pri "arkaiĝinta" materialismo. Ni certe transirus en la idealistan tendaron en la sama tago, kiam niaj idealistoj eltrovus la arton pensi sen cerbo, digesti sen stomako, produkti sen produktrimedoj kaj naski infanojn sen rimedoj por reproduktado, per senkoita[1] gravediĝo...

Ni konstatas, ke nenio en la Marksa materialisma koncepto kontraŭdiras al la modernaj teorioj pri materio. La materialismo de Marks baziĝas ja sur sia dialektika metodo, por kiu ĉio estas movo kaj nenio fiksiĝas en formoj rigidaj. La "animo" mem de l' marksa materialismo estas la "ĉio fluas", la "neeblo eniri dufoje la saman riveron" de l' antikva pensulo Heraklito. La materio povas dissolviĝi en "movon", en "energion", en "elektronojn": neniel malpraviĝas per tio la materialista koncepto pri l'historio.

Sed fakte ĝis nun ĉiuj historiistoj, grandaj aŭ malgrandaj, depost Herodoto (484—425 antaŭ Kristo) ĝis nia epoko (kun malmultaj esceptoj) forgesis, ke por fari historion, necesas unue vivi, kaj por vivi, necesas produktadi; kaj, por produktadi, devas ekzisti sistemo de produktrimedoj kaj de sociaj rilatoj.

Kion oni trovas ekzemple en la Universala Historio de Lavis kaj Rambo (fr.: Lavisse kaj Rambaud), verko dekdu-voluma, grandformata kun dekdu mil paĝoj? La armeo da specialistoj, kiu ĝin prilaboris, kunportis artikolojn pri militoj, bataloj, diplomataj intrigoj, historioj de reĝaj alkovoj, nomenklaturon de literaturaj kaj artaj verkoj. Burĝoj kun klasa intereso skribas en tiaj verkoj sian historion. Vane oni serĉas ion pri la elementoj de l' tuta vivhistorio: la ĉiutaga batalo pro l' ekzisto, la sociaj klasbataloj pro la superregado, la historio de l' laboro kaj de la laboristoj, de l' produktado kaj de la produktantoj.

Se oni volus provi kompreni per tiu multpeza volumaro, kies filozofia valoro tamen estas nula, la mondmiliton, la rusan revolucion aŭ aliajn aktualajn temojn, oni ne sukcesus. Tiom malpli oni trovos ion pri la estonto de la laborista klaso. Tio tamen ne estas miriga. La oficiala kaj tradicia Historio troviĝas pendigita en aeron, sen materia bazo.

La marksismo ĉesigas tiun ĉi idealistan metodon, kiu daŭras depost jarmiloj. Ĝi deklaras, ke la maniero de produktado de ekzisto-rimedoj, kun siaj sociaj konsekvencoj, formas la bazon de ĉia historia vivo. La Historio ĉesas esti fantomaĵo, batalo de Don-Kiĥotoj kontraŭ ventmueliloj ideologiaj. Ne plu estas historio pri rabistoj-politikaj kaj diplomataj. Estas peniga batalo pro la disdivido de l' terglobo, pro la posedo de l' grundo sociigita, pro la riĉoj produktitaj de la laborularo.

Ankaŭ ĝi estas la malrapida, fervorega konkirado de l' naturaj fortoj metataj de la scienco je la servo de l' produktado de ekzisto-rimedoj.

La tute primitiva kvazaŭ tute muskola produktado de l' sklavoj kreas la antikvan socion. La ventmuelilo karakterizas la feŭdan socion. La meĥanika ilo, la vapormaŝino kreas la kapitalisman socion. La elektrigo de l' produktado liveros la materian bazon por la socialismo, kiu havas kiel celon la prosperon de ĉiuj.

La materialisma histori-koncepto plifaciligas tiel la komprenon pri la vera irado de l' okazoj. Ĝi donas sencon al la historio, faras ĝin klara kaj komprenebla. — Marks diris al la socio: "Diru al mi, kion vi fabrikas kaj per kiaj rimedoj, diru, kion vi vendas, kaj mi diros al vi, kia vi estas." La historio ĉesas esti enigmo, rebuso.

* * *

Ni devas klarigi ankoraŭ la dialektikan metodon. Prave oni alnomis la marksismon: "la algebro de l' revolucio". Efektive, la historia idealismo limigas la historion al interpuŝiĝo de ideoj, de opinioj, de pasioj, el kiuj laŭdire devenus "la progreso". La dialektika metodo de Marks fosas pli profunden. Ĝi transformas en problemon tion, kio estas certo por la idealista historiisto. Ĝi faras multoblajn demandosignojn — De kie venas la novaj ideoj? — Kiel kaj kial estiĝas ŝanĝoj en la konceptoj kaj la institucioj?

Kaj la dialektika metodo konstatas jenon: Ĉiu socio konsistiĝas el sociaj fortoj kontraŭaj, el kiuj ĉiu ludas sian rolon en la produktado. Tiuj ĉi fortoj reprezentas interesojn kontraŭstarantajn unu la alian. La unuj estas konservativaj. Ĉar ili celas konservi la privilegiojn, ligitajn kun la malnova produktmaniero. La aliaj estas revoluciaj. Ili kontraŭbatalas la malnovajn privilegiojn por la intereso de novaj produktofortoj. Ili batalas pro la vivo kaj la potenco. Kontraŭbatalante la malnovajn klasojn, la novaj sociaj klasoj kreas samtempe la materiajn kaj sociajn kondiĉojn por nova monda ordo. Kaj la Revolucio plenumiĝas.

Ĉiu scias, ke la infano, antaŭ ol naskiĝi, troviĝas tute antaŭformita en la utero de tiu, kiu ĝin portas. Anstataŭigu tiun ĉi konatan fakton per same konataj objektoj: kapitalista klaso, laborista klaso, meĥanika ilaro, koncentrigo de produktorimedoj, politika povo. Kaj anstataŭ la ĝenerala formulo "algebra" vi havos la historion pri la naskiĝo de nova reĝimo.

Kaj vi povos klarigi al dekjara infano, ke la kapitalista klaso, akaparante fabrikojn, minejojn kaj maŝinojn, kunigante krome en la industriaj centroj laboristojn po milionoj, fosas sian propr-

[1] Koiti = sekskuniĝi.

an tombon. Ĉar la klaso laborista, koncentrita kaj organizita, kiel la kapitalo, povos diri iun tagon: "Kion mi produktis, estas mia!" Kaj forprenante la povon, ĝi prenos fabrikojn, minejojn kaj maŝinojn.

Marks nomas tion la historia dialektiko. Alivorte: ĉiu socio produktas sian propran tomb-fosiston. Kaj samtempe ĝi produktas ankaŭ la elementojn de nova socio: la homojn kaj instrumentojn de laboro.

Certe ĉiu K-do komprenas tiujn klarigojn, ĉar li mem travivas ĉiujn tiujn aferojn en sia laborejo, eĉ ne pripensante tion. La marksista filozofio estas la filozofio de l' proletaro ekspluatata sub la reĝimo kapitalista. Tiu ĉi reĝimo laboras senkonscie kaj, senscie al la liberigo de l' homaro el sia propra jugo. Kompreneble necesas, ke la proletaro helpadu al tiu procezo.

Laŭ Karlo Rapopor (fr.: Rappoport) kompiltradukis N. B.

LA BRITA MINISTO KAJ LIA MONDO

EKZEMPLO KLASIKA DE LABORIST-EKSPLUATIĜO

(Fino. Vidu antaŭan n-on)

Multaj virinoj jam demandis konsilon pri nasklimigo. Tion efektivigi kostus nur 2 ŝilingojn (=0,50 dol.), tamen ili estas tiom malriĉaj, ke ili ne povas elspezi ĉi tiun sumon kaj anstataŭe riskas la naskiĝon de nova ido. En urbo Brajnmoŭr (angle: Brynmawer) el 10 mil loĝantoj laboras nur 400, nome butik-helpistoj, instruistoj ktp. En la karb-industrio, en majo 1928, estis senlaboraj 161 300 personoj kaj duonlaboris 84 290: tio ĉe la fino de vintro, en printempo estas altega nivelo, ĉar tiu ĉi periodo signifas multe da laboro.

La senlaborula mizero

Multaj jam ĉesis esti "asekureblaj" kaj pro tio ne aperas en la registaraj ciferoj. Kaj multaj ekspertoj ja duobligus tiun oficialan kalkulon. Tamen la gazetjo ankoraŭ presigas titolojn: "Brila estonto" — "Senlaborulaj nombroj falas en tiu ĉi monato". Ili falis nur, ĉar iuj laboristoj ne plu ricevas subvencion, sed vagas elreligitaj en la mondo. La parlamentano por Don Vale (Valley) diris: "Se vi volas koni la vivkondiĉojn, vizitu la malantaŭon de l' domoj dum lundo, la lavotago. Tiam vi vidos — ĉemizojn riparitajn per dek diversmaterialaj pecoj, apenaŭ unu virinan subvestaĵon; multaj ne havas duonŝtrumpojn, sed surmetas botojn sen ili. La virinoj timas konsulti kuraciston, ĉar ili ne portas ĉe si subvestaĵojn."

La gazeto "Ĉiutagaj Novaĵoj" (Daily News) raportis, ke dum la Armistica[1] Tago en Nantiglo memorservo ne povis okazi en la kapelo antaŭ 7.45 h. vespere, ĉar la viroj ne posedis vestaĵon sufiĉe decan por porti ĉe la tiutaga parado. Ili havis bonajn vestojn por militiri en Francion, sed nun — —!

Malsatantaj patrinoj

Nun iom pri la patrinoj. Tiuj patrinoj, kiuj venas al la infan-konsilejo (angle: "Child welfare centres") montras klarajn signojn de nutromanko, — raportas la sankontrolisto por Okcidenta Jorkŝe. "Kiam patrino volas konsilon, kiel nutri la infanon, mi konsilas, ke la ido suĉu ĉe la mamo dum dek minutoj, eĉ se neniu lakto responde venas, ĉar tiel ekscitiĝas la laktoglandoj. Poste la infano povas ricevi aldonan nutraĵon el botelo." Sed estas tute neeble por ili plenumi tiun konsilon. Spite la plej persista peno dum tri semajnoj aperas neniu lakto. Malsata, premata, zorgplena patrino neniel povas provizi lakton. Kaj ĉi tiu neebleco nutri la novan idon memevidente plialtigas la vivkoston de l' familio.



Bildo de K. Kolvic

La porlaborista salajro estas ja minimuma, kaj vi mem povos imagi, kiel vivas la senlaborulo, kiu kun edzino ricevas subvencion de 26 ŝil. semajne (= ĉ. 6 dol.) kun aldono de 2 ŝil. por ĉiu infano. En multaj okazoj tio estas nur 25 ŝil. por viro, edzino kaj ido, ofte donataj en formo de manĝ-biletoj, kiujn la terposedanto ankaŭ akceptas anstataŭ mono pro lupago de domo. En la Blenen (Blainan)-distrikto, kie la kooperativo provizas la plejmulton da manĝaĵo, la jara vendo falis de £ 80 000 al 20 000 dum kvar jaroj, malgraŭ ke la loĝantara kvanto restis pli malpli la sama.

La butikistoj ankaŭ suferas. En strato de Kimria vilaĝo vi povus vidi sep fermitajn butikojn, kaj la samo estas fakto en la distriktoj Suda Stefordŝe (Staffordshire), Jorkŝe (Yorkshire), Darem (Durham) kaj Northömberlando. En unu urbeto vi povus vidi tridek malplenajn vendejojn. Kio okazas al tiuj eksbutikistoj, neniu scias. Ili ricevas nenian subvencion, ĉar ili ne estas laboristoj. Unuj sidas hejme en malespero, aliaj malaperas el la distrikto.

Ĉe la monpruntejoj

La dom-problemo ja prezentas kuriozan flankon. En ĉiu minista distrikto vi povas promeni laŭlonge de tuta strato, kies postmilitaj domoj konstruitaj laŭ ĝardenurba plano estas ĉiuj malplenaj. Dum en la proksima strato troviĝas 2—3 familioj kune loĝantaj en unu dometo, por tiel ŝpari je lupago. Aŭkciosalonoj estas plenplenaj per meblaro, kaj la monpruntisto ne plu donas monon kontraŭ vestaĵoj, kudromaŝinoj ktp., ĉar li scias, ke la pruntinto neniam plu revenos por ilin repreni. Vestaĵo, por kiu li donus en bonaj tempoj 10 ŝil., nun malfacile pagiĝas per 5 ŝil.

Oni aŭdas multajn fanfaronojn pri la registara plano transkonduki homojn el bankrotaj al prosperaj distriktoj. Sed en ĉi tiu lando mi ne scias, kie troviĝas eĉ unu tia prospera distrikto.

Degeneranta junularo

Ekzistas en Suda Kimrio, sed ankaŭ en aliaj min-teritorioj miloj da junuloj, 20-jaraj, kiuj depost la forlaso de l' lernejo antaŭ ses jaroj, ne laboris eĉ unu solan tagon. Eble ĉi tiuj junuloj estiĝas al plej grava problemo por la socio, eĉ pli grava al la malsataj patrinoj. Almenaŭ la virinoj restas hejme, pasive suferas kaj sin oferas. Ili ne fariĝas minacaj nek danĝeraj, sed apenaŭ ĉirkaŭe promenas duonvive naskante malfortulidojn. La junuloj vagadas, pretaj por ĉiu malbonago, tute ne disciplinitaj, duonnutritaj, en ĉifonoj, kiuj ne permesas al ili sin respekti.

Ili minacas al la socio kaj fariĝas krimuloj. Ili naskas neleĝajn idojn, kies patrinoj apenaŭ maturiĝis. Ili senhezite diras, kiam oni riproĉas kontraŭ ili: "Kial ne? La maljunuloj metis nin en ĉi tiun ĥaoson, ni ne petis pri naskiĝo. Nun iu ajn, kiu volas, povas nin subteni." Unu, du glitas en la armeon aŭ militŝiparon; aliaj, kiuj ne povas plenumi la minimumajn korpopostulojn, faras etajn krimojn, ŝtelas karbon ktp., kaj ĉar ili ne povas pagi la monpunon, ili iras suben al la malliberejo.

Tiu ĉi bildo estas maldolĉa. — Precipe por eks-soldato, kiu kredis batali por lando, taŭga por herooj, estas maldolĉe resti tiel devige senokupa. Vidi sian hejmon malaperi gradon post grado en la publika aŭkcio, vidi siajn idojn subtenataj pro filantropio, vidi sian edzinon morti ĉe siaj piedoj, vidi siajn junajn posteulojn, pro kiuj li tiom fieris kaj esperis, lin malbeni, ĉar li ilin naskigis. Estas maldolĉe por tiuj viroj, multe da ili religiaj, aŭdi siajn filojn prediki ekstreman ateismon kaj esprimi ĉiujn blasfemojn, kiuj laŭkrede irigos ilin al la infera fajro.

Sed eĉ ekzistas pli granda malbono, t. e. la maniero, laŭ kiu ili ricevas la subvencion. La administranto diras al ili: "Vi ne vere serĉas laboron." Tia malvero! Kiel estas eble fari tion, se mankas ĉia labor-ebleco, se la ŝaktoj restas fermitaj, se eĉ la pumpiloj ĉesis funkcii. Rifuzo de subvencio al ili signifas tutan ruiniĝon. Fraŭloj ricevas nenian subtenon, ili aŭ vivas ĉe amikoj aŭ vagadas. Kiom longe la parohoj subtenos la senlaborulojn, neniu scias. Ĉe unu paroho en Bedvelti (Bedwellty), ĝia

[1] Batalhalta.

ŝuldo al la registara departemento estas unu miliono kaj centmilo da funtoj sterlingaj (ĉ. 5½ milionoj da dol.), por kiu la rentumiĝo semajna estas mil funtoj (ĉ. 5 mil/dol.).

Konkludo

Kaj la elirejo? — Oni povas akuzi min pro partieco, se mi fingromontras al la akiroj de l' akciuloj kaj terposedantoj. Sed mi interesiĝas pri tiu unu fakto. Mi konas eĉ ne unu inter tiuj uloj, kiu devus vagadi "serĉante laboron" kun malplena stomako kaj rompitaj botoj, lasante hejme nenormalan idon kaj edzinon sen subvestoj. Sed mi konas multajn ministojn en tia situacio.

Iu direktoro de Fer- kaj Ŝtalo-Kompanio (angle: Tredegar Coal & Iron Co.) mortis en lasta oktobro kaj postlasis sian tutan posedon — 60 mil funtojn (= ĉ. 300 mil dol.) al la "Reĝa Societo por malebligo de krueleco al bestoj". El la ministoj, kiuj mortas, ne multaj postlasas sufiĉon eĉ por enteriĝi.


Leonora Eyles.

Trad. laŭ la revuo "19-a jarcento" (jan. 1929) I. Floro.

FRANCA SUDANO

(Daŭrigo. Vidu antaŭan n-on.)

La historio de Sudano, same kiel tiu de eŭropaj landoj, estas riĉa, multeŝanĝa. Oni maldetale konas ĝin, sed oni scias, ke vilaĝoj, triboj, gentoj ade intermilitis. Kelkfoje iuj gentoj sukcesis militakiri kaj ŝtate organizi vastajn regionojn. Ankaŭ iufoje Marokanoj koloniigis Nigeran Sudanon. Tamen, malgraŭ la ofta malpaco, Nordafrikanoj kaj Sudananoj, precipe Nigeranoj, konstante negocis. Ĉi tiuj interŝanĝis siajn oron, eburon, strutplumojn, felojn, gumon kaj aliajn varojn kontraŭ ŝtofoj, ledaĵoj, juveloj, armiloj, salo k. a., enportitaj per dromedaraj karavanoj tra Saharo.



La salo estis treege multekosta pro sia malofteco. Ĝin oni enportis precipe el malproksimaj minejoj en Saharo. Eĉ ankoraŭ nun indiĝenoj de malproksimaj vilaĝoj ofte preferas salon anstataŭ mono, kiam oni aĉetas ion al ili.

Prosperaj komercaj rilatoj kun la Nordo

Sekve de la daŭraj negoc-interrilatoj, la nordafrikanoj inokulis multe el sia civilizo al la primitivaj negroj, kiuj el fetiĉistoj fariĝis mahometanoj. Sed en sia nova religio ili konservis multe el la fetiĉista. Ili ne estas fanatikaj, kiel ekzemple la araboj. La negraj mahometaninoj ne vualkaŝas sian vizaĝon kaj estas pli liberaj, pli sendependaj ol arabinoj.

Pro sia taŭga situacio Tombuktu fariĝis la koro kaj la cerbo de Nigerlando. Sojle de la dezerto, je kvin kilometroj norde de la granda rivero, ĝi estis kvazaŭ haveno, kien alfluis la riĉaĵoj de l' ĉirkaŭantaj negraj landoj por esti ŝanĝitaj kontraŭ la varoj enportitaj de Norda Afriko. Ĝi havis faman negran universitaton, en kiu oni instruis precipe pri religiaj aferoj.

La prospereco de Tombuktu iam disfamiĝis ĝis Eŭropo, sed la eŭropanoj ĝis la franca okupado ne sciis multon pri tiu malfacile kaj danĝere alirebla urbo kaj pro tio nomis ĝin la mistera. Nuntempe ĝi estas negrava urbeto, kaj nur ruiniĝantaj moskeoj atestas pri iama prospereco.

De kelkaj jaroj Bamako estas la nova negoca centro kaj ĉefurbo. Ĝi oportune kuŝas ĉe vojkruciĝo: fervojo ĝis Dakar, rivervojo almonte ĝis Tombuktu kaj plue, kaj alvale ĝis Kurusa[1], de kie fervojo iras al atlanta franca haveno Konakri[2]. Pli kaj pli Bamako fariĝas grava. Antaŭmilite ĝi estis malgranda vilaĝo. Nun ĝi nombras pli ol 25 mil loĝantojn, el kiuj nur ĉirkaŭe 800 estas eŭropanoj.

Sociaj, religiaj moroj

La Korano estas la fundamento de l' socia organizado de l' negraj mahometanoj, kvankam ili konservis multajn regulojn kaj kutimojn de sia malnova fetiĉa religio. En ĉiu vilaĝo, la "marabuto" — mahometana pastro — zorgas pri ĉiuj religiaj kaj civilaj aferoj (geedziĝoj, naskiĝoj k. s. ceremonioj). La vilaĝestro zorgas pri ekonomiaj kaj iam militaj aferoj. Nun li estas respondeca antaŭ la francaj administrantoj.

Ekzistas ankoraŭ du gravaj personoj: la sorĉist(in)o kaj la poeto-kantisto indiĝene = grio). Al la unua oni atribuas heredajn sorĉkapablojn kaj ĝi sin okupas precipe pri kuracado. La dua kun primitiva kordinstrumento iras de vilaĝo al vilaĝo, kie oni dungas lin okaze de festo aŭ festeno, por muzikludi kaj kanti. La negroj ŝatas multe "tamtami", t. e. danci akompanate de orkestro kun primitivaj instrumentoj. La unutona, stranga muziko neniel similas tiun de civilizitaj landoj, eĉ ne tiun de la negraj orkestroj — "ĵazoj".

Kiel mahometanoj, la negroj estas poligamiuloj kaj aĉetas siajn edzinojn. Ofte la junulinoj estas fianĉaj, kiam ili estas ankoraŭ infanoj, eĉ iufoje tuj post sia naskiĝo. Kiam la fianĉino viriniĝas, ne atentante pri ŝia aĝo, oni permesas al la fianĉo edziĝi kun ŝi. Tial la negrinoj estas ĝenerale edzinigataj tre junaj, de ĉirkaŭ la 12-a jaro. La geedzoj ŝatas naski multe da infanoj, kaj naskiĝo de filo pli kontentigas ilin ol filino. Ili klarigas, ke filinoj estas vendotaj, kaj konsekvence post vendado havas nenian devon kontraŭ siaj gepatroj; male la filoj estas leĝe devigataj ĉiam zorgi pri flegado kaj vivrimedoj al siaj gepatroj, kiam tiuj ĉi fariĝas malsanaj aŭ maljunaj.

[1] France: Kouroussa.
[2] France: Conakry.

Vestado kaj loĝado

La kostumoj de la negroj estas diversaj. Iuj estas pli malpli riĉe vestitaj, aliaj ĉifone. Iuj, precipe en la vilaĝoj, apenaŭ kaŝas siajn seksorganojn. Ĝenerale ili sin vestas per simplaj, larĝaj, praktikaj vestoj el malpezaj kotonaj ŝtofoj. Hejme kaj dum laboro, eĉ sur la strato, la geviroj havas ofte la bruston senvesta. Genegroj multe ŝatas la kolorriĉajn ŝtofojn kaj la juvelojn. Nun en la urboj multaj viroj emas sin vesti kiel eŭropanoj. La negocistoj, kiuj tiras profiton el ĉio, vendas al ili vestaĵojn eluzitajn kaj malfacile vendeblajn en Eŭropo.

De la vidpunkto de higieno la Sudanaj negroj estas ĝenerale puraj; ĉiutage ili lavas kaj ofte banas sin. Male la Tuaregoj kaj Maŭroj estas malpuraj, eble pro la manko da akvo en la regionoj, kie ili loĝas.


La loĝejoj estas primitivaj dometoj masonitaj tute el premita tero kaj tegmentitaj el pajlo. Ili havas ĝenerale nur unu ĉambron, malofte du aŭ tri. Ĉiujare estas necese stuki la murojn, ĉar la torentaj pluvoj facile difektas ilin.

La karaktero de la negroj

Malgraŭ la araba civilizo la negroj de Sudano restis relative primitivaj kaj tial havas infanecan karakteron. Kiel infanoj, pri io ajn ili ridas kaj amuziĝas. La klimato igas ilin apatiaj kaj malaboremaj. Ŝparo, profito, antaŭzorgo estas vortoj nekonataj de ili. Ili vivas laŭtage, ne antaŭzorgante, ne agante pri eblaj okazontaĵoj. Ili kontentiĝas per streĉa minimumo por vivi. Fizionomie ili aspektas malseveraj, afablaj, inteligentaj, kaj vere estas tiaj. Tiuj homoj estas vere indaj ne je kapitalista, sed je vera civilizado, kiel la socialismo konceptas ĝin. (Finota.)

13 706.

POR NIA DISTRO



"Ne kisu min, kiam alrigardas la bovino, aliel mi ruĝiĝos kaj ŝi ekatakos nin."

EL USONO

Se la laboristo ne povus legi, eble li vekiĝus, ĉar en Usono la ĵurnalaro estas dormigilo. Laŭ raporto 50 milionoj da ekz-oj da ĵurnaloj vendiĝas en Usono ĉiutage. La reklamado regas la ĵurnalaron, ĉar laŭ oficiala statistiko la posedantoj de la ĵurnaloj ricevis dum 1927 por reklamoj $ 724 837 083, por abonoj $ 252 811 104. Same en revuoj, gazetoj ktp. por reklamoj oni pagis $ 305 383 936, por abonoj $ 176 656 640.

En la tuta pres-industrio 261 671 laboristoj ricevis mezan salajron (dum 1927) de $ 1808 dolaroj. Eldoniĝis libroj en tiu jaro jene: pri scienco kaj tekniko, 2 392 044; pri sociologio kaj ekonomio, 875 191; pri terkulturo, 282 861; pri filozofio kaj religio, 22 220 536. Sed romanoj nombriĝas je 36 533 507 volumoj kaj la porjunula libraro je 31 047 094.

Reklamkaptilo, distrilo, forgesilo, sed nur malplejparte edukilo, jen rolo de la presilaro nuntempe.

* * *

Longtempe kaj laŭte la usona farmisto plendas pro la malalta prezo de greno ktp., kiun li volas vendi, kaj pro la alta prezo de fabrikaĵoj ktp., kiujn li devas aĉeti. Spite la fakto, ke Huver fanfaronas pri "malglata individuismo" (angle: rugged individualism) li nun favoras kolektivan registaran helpon en la organizado de kooperativoj, per kiuj la farmistoj kolektive aĉetas kaj vendas kaj kredeble eksportas siajn produktojn. Ankaŭ li kaj la Senato favoras tarifon.

* * *

Eĉ en necesejo oni sukcesas kolekti argumenton por esperanto. Ĉar tie mi rimarkis, ke usona firmo devas presi la banderolon por ""tualet-papero" en la angla, japana, ĉina, germana, itala, hebrea, — sume en 10 lingvoj!

(488)

Plifirmiĝo de l' faŝista reĝimo en Polio

La ega subpremado kaj turmentado al la laborista klaso, al la vastaj popolamasoj, fare de Pilsudski kaj lia tielnomata "Majregistaro"[1], ankoraŭ ne atingis la plej altan gradon. Ni ne devas nin trompi. La faŝista reĝimo ne tiom rapide cedos sian lokon al proleta sociordo. Konstatebla estas la malo. La nuna renovigita registaro plifortiĝas, plipotenciĝas de tago al tago. La sistema militigo de l' lernejoj, sub trompa masko de "korpkulturo", pludaŭras. La pormilitaj elspezoj kreskas senĉese kaj premegas la malriĉiĝintajn urbajn kaj vilaĝajn laborulojn. Anstataŭ loĝejoj kaj lernejoj oni konstruadas kazernojn kaj malliberejojn. Oni starigas firman baron kontraŭ la ribelontaj amasoj.

Karakteriza por la situacio estas ĵus aperinta libro, eldonita de la Instituto por Arme-scienco, sub titolo: "Stratbataloj". Aŭtoro estas iu Stefan Radecki, regimentestro ĉe generalstabo. Tiu ĉi oficiala "aktuala" libro meritas ioman priparolon. Ĝi enhavas sur 286 paĝoj vere senhontajn regulojn kaj instrukciojn, kiel mortigi la amasojn, kiel mortpafadi la popolon ribelantan. Ne eblas citi la bestecajn diraĉojn; mi prenu nur unu eltiraĵon, kiun mi tradukas laŭ la o r i g i n a l o (forlasante kelkajn tekstojn). Tie estas skribite:

"Ĉiuj ribeloj komenciĝas per manifestacioj de la amasoj. Por ilin kontraŭbatali necesas sci-koni la amaspsikologion kaj ankaŭ la plej trafajn rimedojn kontraŭefikantajn.

"Ĉiu izolulo estas plejparte kvieta kaj respondeca, sed ĉiu organizita amaso freneziĝas kaj blinde, senkonscie ribelas. La sola unika rimedo por ĝin trankviligi estas — potenca armilaro.

"La unua kondiĉo — ne permesi al la homoj amasiĝi kaj dispeli, dispecigi la unuajn grupetojn. Ne sukcesante, oni devas plej rapide perforte disbati la obstinulojn.

"La agoj devas esti energiaj kaj fulmrapidaj. Ĉiu homamaso estas dekomence hezitema kaj nedisciplinita. Sekve la militestro devas eluzi la ĝustan momenton por subpremi la revoluciemajn intencojn de la amasgvidantoj. La soldataro nepre elmontru sian kuraĝon kaj fortan decidvolon. Per tiaj agmanieroj ĝi elvokos al si respekton kaj timemon inter la kolektiĝintaro.

"Neniaj alproksimiĝoj nek interparoloj inter la soldatoj kaj la amaso estas allaseblaj. Se oni havas kontraŭ si organizitan amason, oni devas nepre senkondiĉe kaj plej rapide uzi armilojn. Se la manifestantoj intencas alproksimiĝi al la militistaro por agiti aŭ senarmigi ĝin, oni devas signali dufoje per fajfilo kaj tuj poste — armilaro. Komence oni ordinare uzu nur bajonetojn kaj pafiltenilojn. Se tio ne efikas, devas sekvi paffajro!

"Akre kaj kategorie estas forigenda la ĝisnuna aserto, ke la militistaro ne ekpafos la unua; tio esas malĝustaĵo. Ni — la fidela soldataro — devas ĉiam ekkomenci!

"Neniaokaze oni rajtas ekpafi aeren, 'blinde', nur por ektimigi; tio elvokas malestimon kaj malŝaton al la armilaro flanke de la amaso. Oni pafcelu ĝustmaniere, por ke la amaso ne opiniu la aferon "ludilo" kaj malrespektu ĝin.

"La pafado devas esti direktata rekte en la homamasojn. La plej bona celo de l' pafoj estas la piedoj. Ofte la amasgvidantoj sendas renkonte al la pafantoj virinojn kaj infanojn kaj malantaŭ la lastaj la ribelularo mem provatakas la militistaron. Tiuokaze oni devas disbati la unuajn virin- kaj infanvicojn kaj forpeli ilin per bajonetoj kaj alia "malvarma armilaro", kaj en la sekvantajn

[1] En majo 1926 okazis la diktatoriĝo de Pilsudski.

LA MORTO DE LA VIRGULINO

(Fino. Vidu n-on 244)

Jen estas fasko da faktoj, eltiraĵoj el samtempaj kronikoj, dokumentoj, eĉ el la — certe nesuspektindaj — spezlibroj. La legintoj konkludu mem.

Miaflanke, mi jam ne dubas pri la bruligo de Johanino d' Ark. Mi ne dubas, ĉar el tiuj faktoj mi ne povas ne konkludi, ke ŝi ne estas pereinta en flamoj en Ruan (Rouen) en j. 1431. Mi ne dubas, ke ŝi postvivis "sian morton" kaj rezigninte je kavalira gloro, kiun ŝi certe estis meritinta[1], en trankvila edzina stato, kiel feliĉa edzino kaj bona patrino, ĝisvivis siajn tagojn.

Certe — tiaj "miraklaj" savoj okazas maloftege. En historio ĉiu eksterordinaraĵo devas veki nian pravan suspekton (ekz. la fama historio pri rusa pseŭdocarido Demetrio en XVII. jarcento). Tio tamen ne pruvas, ke ili absolute ne povas okazi.

[1] Ŝi estis unu el la unuaj armeestroj, kiuj komprenis la gravecon de artilerio kaj sciis ĝin lerte uzi.

Kiel do kreiĝis la legendo? Kial la pastraro false aŭ malfalse, konscie aŭ nekonscie pri la vero trumpetis laŭtege pri la martireco, sankteco, virgeco ktp. de Johanino? Tutsimple: bruligo de iu persono en Ruan (en j. 1431), kiun la angloj nomis Johanino d' Ark, estas fakto nekontraŭdirebla. Kaj tiu fakto estis bela materialo por legendo. Ekzistis ja aliaj, samkiel la Virgulino, bravaj heroinoj samtempaj — Katerino de Roŝel (fr.: Rochelle) kaj Petrino la Bretonino (fr.: Pieronne la Bretonino). Kial iliaj nomoj forgesiĝis? La morto faris Jesuon dio; Johanino almenaŭ en legendo devis morti martire por akiri gloron. Ŝiaj koleginoj estis simplaj virinoj. Ŝi devis resti virgulino, por ke oni povu proklami ŝin sankta. Ĉu povus ja esti sanktulino la postvivinta honesta edzino kaj patrino? Tio ja spitus ĉiujn konceptojn de mezepoko! La legendo d e v i s kreiĝi, oni d e v i s forgesi la realan vivon de l' heroino, kaj la pastraro d e v i s subteni la legendon por eviti riproĉojn pro la maljusta kondamno.

La rehonoriga proceso en j. 1455 esploradis ne la vivon de Johanino, ne la tutan aferon, sed nur pravecon de motivoj de la kondamna verdikto. Johanino cetere estis jam mortinta (en j. 1449 aŭ 1450); oni do ne bezonis tuŝi la legendon. Ĉar la legendo kaj ĝenerala opinio postulis rehonorigon, oni ĝin devis fari por ne malamikiĝi kun la popolo. De tiam la legendo kreskis kun ĉiu jarcento. La naciismo metis sur sian standardon nomon de la "heroa Virgulino" — la Eklezio ne kontraŭstaris tion. Kaj kiam kreskanta fermento socia devigis la reakciularon kuniĝi, la Eklezio ne povis resti ekstere. En 1874 la episkopo de Orleano Düpanlu (Dupanloup) ekpledis por "beatifiko" (sanktigo) de la "sankta" heroino. Ĉi tiu ledo estis pli forte ligonta al Eklezio la reakciularon por kuna batalo kontraŭ la nova "liberale" burĝa respubliko. Sed la reakciularo kaj "liberala" burĝaro havis tiom da komunaj interesoj, ke daŭra interbatalo estis neebla.

Bonege komprenis tion genia politikisto, papo Leo XIII. Se la Respubliko (t. e. burĝaro) ne volas servi la Eklezion, la Eklezio devas servi la Respublikon por ĝin sklavigi. Kontraŭstaro de franca pastraro ĉesis subite kaj por flati la naciecan senton de la Respubliko,

vicojn de l'amasoj oni ĵetu eksplodmortigajn manbombojn.

"Neniam kaj neniel oni kompatu la ribelantojn. Ne ŝparu kuglojn kaj — rekte en la amasojn!"

Jen vere detala kodo pri sovaĝbesta buĉado al propraj gepatroj, edzinoj kaj infanoj. Sed tio estas nur unu "floreto" el multegaj abunde florantaj en tiu libromarĉo. Ŝajnas nenecese malŝpari vortojn por plie priparoli tiun oficialaĵon eldonitan per la mono rabita de l'popolo — mizere ŝparitaj moneroj de la suferantaj amasoj. Vere, ne vortoj, nur agoj, akraj kaj decidplenaj, povos fine liberigi el tiu faŝisma infero!

M. G. (10099).



Paĝo el infana vivo

Ekestis printempo. Ĉie degelas neĝo kaj glacio, kaj bruaj riveretoj de ĉiuj flankoj fluas al la rivero. Sur la korto kaj kamparo estas netrairebla koto, kiu devigas la geknabojn de l'infana kolonio kunveni post tagmanĝo en sia komunloĝejo.

La geknaboj organizas kvartetludon[1] en esperanto. Nina Samijlenko, 13-jara knabino, disdonas la kartojn, kaj la infanoj komencas ludi.

— K-dino Cibulkina! Ĉu vi havas urbon Dresdeno en Germanio? — demandas Anjo Doronina.

— Jes, mi havas ĝin.

— Donu al mi!

— Jen prenu, — diras Cibulkina kaj faras indiferentan mienon, ĉar krom Dresdeno ŝi havas ankoraŭ Hamburgon kaj, se Anjo ne divenos tion, ŝi facile kolektos poste ĉiujn kvar urbojn el la sama lando.

Subite la infanoj rimarkas sian instruiston de esperanto, kiu eniris la ĉambron kaj staras apud la pordo.

[1] Kartludo demanda kaj responda kun kvaropaj serioj.

— Nu, infanoj, ĉar la vetero estas hodiaŭ malbela kaj neniu el vi promenos, ni skribu kolektivan leteron al geknaboj de Magdeburga popollernejo. Ĉu vi konsentas?

— Ho jes, jes! — ĝoje ekkrias la infanoj, kaj tuj la kartoj estas forĵetitaj.

Ĉiuj altabliĝas kaj proponas diversajn temojn por korespondaĵo. Finfine, per komunaj fortoj, la letero estas verkita, kaj ni komisias transskribi ĝin al Mara Kudrenko, kiu havas belan skribmanieron.

Poste la instruisto organizas ĥorkantadon. Bele kaj potence sonas elektitaj el SAT-Kantaro kantoj de diversnaciaj popoloj. Sed kun la plej granda vervo kantas la infanoj kanton verkitan de l'instruisto "Nia kolonio", kiu vekas iliajn plej bonajn sentojn. Ĝi estas kantata laŭ la melodio de fama studenta latinlingva kanto "Gaudeamus igitur..." Jen estas la paroloj de tiu ĉi kanto:

Ĝoju, ĝoju, la infanoj,
Dum ni junaj estas.
En infana kolonio
Lernas ni internacian
:: Lingvon esperanto ::

Vivu nia kolonio,
Knaboj kaj knabinoj,
Vivu niaj instruistoj,
Edukistoj, ĉarpentisto,
:: Ankaŭ la forĝisto! ::

Ni promesas bone lerni,
Esti diligentaj.
Estu nia kolonio
Kvazaŭ unu familio,
:: Kvazaŭ unu gento. ::

Ne moku, kara leganto, ke la infanoj kantas eĉ pri forĝisto. En la kolonio li ja estas grava kaj necesa persono, krom tio SEU-ano.

Tiel pasas la posttagmezaj horoj en Loŝkarivska infana kolonio[1]. Fremda observanto facile povus imagi, ke li troviĝas en ia Esperantio, ĉar en ĉiu ĉambro oni povas ekaŭdi babiladon, ŝercojn aŭ kantadon en esperanto.

La infanoj utiligas sian ripozon laŭ siaj individuaj inklinoj.

N. Aleksandrov (5875).



La Poeto proleta

Mi ne kantas la amon,
Mi ne kantas la ploron,
La mizeron ne kantas mi larme. —

De l'indigno la flamon,
De la lukto la gloron
Mi rakontas al ĉiuj senĉarme...

Mi batalas perkante,
Mi batalas permane,
Mi la bruston — la rokon starigas

Kontraŭ ventoj mokante;
Kaj la mok' uragane
Al la lukto aliujn instigas...

— Ĉu vi estas sensenta?
Ĉu vi estas senkora? —
Eble iu demandos kun miro. —

— Kantu vi pri la vento,
Kantu vi pri l' laboro, —
Sed ĉu florojn ne ŝatas la liro? —

— Ne! — respondos mi arde —
Volas amon la koro,
Ŝatas mi la herbejan ornamon, —

Sed mi staras nun garde
Por la venk' de l' Laboro, —
Mankas temp' por kultigi la amon!

Mi pretigas militon
Kontraŭ la kapitalo
Por la nova sunluma vivado...

Kaj ĉe la barikado
De la amo inviton
Mi ne aŭdas pro bru' de l' batalo.

Kaj komprenu, amikoj,
Ke la amo sub vipoj
Kun la floroj, rompataj de hufo, —

Estas am' de formikoj
Viandaĵo dum stufo:
Velkas floroj kaj sekas la lipoj

Tiam l' amo min ĉarmas,
Tiam ravas la floro,
Kiam ili ne estas de l' sklavoj...

Do, ni ĉiuj nin armas
Kaj batalas kun gloro
Per grenad', bajonetoj kaj glavoj...

La epoko sunplena venos post la batal'
Kaj lumados l' aŭror' al la tero —
Tiam nur logos nin de l' printemp' karnaval',
Tiam ĉarmos nin l'am' jam libera!...

N. S. Pargaĉevskij (11746).

[1] Ni aperigis jam artik. pri tiu kolonio en n-o 231.

---

la papo decidis doni al ĝi "nacian" sanktulinon. En 1894 ŝi estis proklamata "adorinda" (venerabilis) kaj en 1895 komenciĝis ŝia beatifika procedo. Tiu operacio povis efektiviĝi sen troa laboro: la pacientino estis ja mezepokulino, do, kiel multegaj aliaj, ankaŭ mistikulino. Fikso de teologia diagnozo ne estis malfacila. Ĝi ne prosperis tamen facile. Potenca ondo de libera penso trafluis Francion. Liberala tradicio estis ankoraŭ sufiĉe forta, la burĝaro ne ekkonsciis ankoraŭ klare sian intereson: kuniĝinte kun efektive liberpensa laborista movado ĝi faligis la sanktajn murojn — la jaro 1906 ŝajnis krevigi inter la Respubliko kaj Eklezio netranspontseblan profundon.

Nun ne temis jam pri flato al la Respubliko: oni devis batali, batali pro ekzisteblo kaj kolekti ĉiujn fortojn al la batalo. Al siaj ŝafoj oni devis doni standardon ne nur sanktan, sed ankaŭ nacian. Ripetiĝis la samo, kio okazis en j. 1874: Johanino d'Ark estis gvidonta denove sanktan militon — jam ne kontraŭ la eksterlandanoj, sed kontraŭ enlandaj malpiuloj, kaj en 1909 papo Pio X ŝin beatifikis. Posta kanonizo estis jam tiam decidita. La sagaca politika manovro donis siajn fruktojn. Post la milito la franca burĝaro devis forlasi liberan penson, devis turni sin reen al la Eklezio; la libera penso fariĝis en manoj de l'proletaro danĝera batalilo kontraŭ iamaj "liberaluloj".

La Respubliko kapitulacis; ĝi subtenis kongregaciojn, enlasis monaĥojn, redonadis konfiskitaĵon, kaj la Eklezio "mizerikorde" (kompateme) prezentis sian protekton al la pentema filo. En 1922 la franca episkoparo proklamis oficiale la Eklezion unika digo kontraŭ la ruĝa ondo. Kelkajn jarojn poste ĝi kondamnis la kontraŭrespublikan francan monarkismon. La sagaca politiko de Leo XIII praviĝis — la Respubliko dankeme klinas sian nukon sub jugon de l'Eklezio. Adorante la "nacian heroinon", ĝi kisas pantoflon de la papo.

— — — — — — — — — — — —

Kiaj do estos pluaj sortoj de la legenda Johanino d'Ark? Sorĉistino kaj herezulino, heroa Virgulino kaj sankta heroino, standardo kontraŭrespublikana kaj garantiaĵo de paco kun la burĝaro — kio ĝi fariĝos ankoraŭ?

M. Arco (909).

DISKUTEJO

Pri la seksa temo

En "S-ulo" n-o 240 mi legis amuzan artikolon de K-do Kozako. Li bone scias elekti virinojn! Lia edzino devas esti tute moderna; s p o r t a, b e l a k r i ĉ a. Ŝi devas scii rajdi, skii, ĉasi, salti, kuri ktp. Mi emas eĉ kredi, ke li forgesis postuli de ŝi iomete da boksa ekzerco! Ŝi ne devas esti iu "timigilo". Ŝi devas esti laŭ lia kaprica fasono. Rilate la financan vivrimedon, ŝi devas esti tute sendependa. Ŝi devas posedi sufiĉe da mono por neniam postuli de li kelkajn monerojn, ĉar male la financa kontrakto perfortiĝos.

Jes!... Mi konsentas lian preferon; sed diablo — la aferoj neniam sin prezentas tiel, kiel oni ĝin revas. Do, ni devas rigardi la mondon tiel, kiel ĝi estas k ne tiel, kiel ni ĝin imagas.

Pri la financa vidpunkto jen mia opinio: Kvankam neniu virino kuraĝas diri la veron pri tio, tamen mi estas certa, ke neniu el ili kuraĝas malkonfesi ĝenon: Por ke proletino povu vivi finance sendepende de l' viro, necesas, ke ŝi rikoltu de sia laboro tiom, kiom viro ricevas, t. e. egalan salajron. Tiam ŝi ne bezonos sin submeti al la hontaj voluptaj kapricoj de l' viro, por eviti malsaton. Do, ĉe la "laboristoj" financa sendependeco estas ĝenerale neebla en kapitalista reĝimo.

Pri beleco, mi opinias, ke neniu kulpas la naturajn difektojn. Kiu ajn sin konsideru pli valora pro sia beleco, meritas nek estimon nek adoron nek simpation de konscia persono, sed ĝian mokon k malatenton. Fieri pro sia beleco, estas insulti la nature difektitajn gefratojn. La fizionomia beleco "supervaloras" nur en la mona mondo. Sed tiu sklaviga abomena mondo troviĝas en la dekadenco k dank' al ĝia pereo, la beleco ne "malsuper-", sed "egalvaloros".

La laboristino estas duoble sklava dank' al siaj amaj kvalitoj. Ŝi vendas kiel viro sian laborforton por duono da minimuma salajro al la kapitalisto k sian korpon por la cetera duono al siaj labork-doj. Tiuj diboĉemaj viroj aplaŭdas feminismon nur antaŭ la oratoroj, sed baldaŭ oni trovas ilin subtenante prostituejojn per siaj superfluaj elspezoj. Paroli eĉ la papagoj kapablas; sed agi racie estas multe pli diabla.

Koncerne la fizikan vidpunkton, mi opinias, ke la unuaj instrukcioj devas esti seksaj. Por gelaboristoj la seksa eduko estas unu el la plej urĝaj. Se tiu eduko estas sufiĉe detala, ĝi liberigos ambaŭ gehomojn de multaj mallumaj antaŭjuĝoj. Ĝi helpos forigi la religian koncepton, kiu estas unu el la plej danĝeraj; enkondukos la modernajn higien-metodojn; montros la vojon de l' sendanĝero; anstataŭigos la mistikan per la racia moralo. Unuvorte, perfekta sekseduko pli valoras ol ĉiuj sportoj elektitaj de nia K-do Kozako.

Tiu problemo estas gravega k priparolinda. Mi kredas, ke ĝi estus por SAT unu el la plej gravaj entreprenoj en kultura vidpunkto. Ni estas sufiĉe maturaj k kompetentaj por eldoni detalan verkon en tutmonda lingvo. Ni "nur volu"! La mondo atendas! For la hipokrito! Jen skizo de l' farota verko:

Ĝi konsistu el almenaŭ kvin partoj nome:

1. A n a t o m i o : Klarigo de l' seksaj anatomiaj partoj (inaj k viraj) ilustrita per kelkaj simplaj bildoj, se eblas. 2. S e k s a f u n k c i o : detale mencii la movojn, fluojn, premojn k iliajn kombinojn. Klarigi la kaŭzojn de la neeviteblaj konsekvencoj. 3. H i g i e n o : montri, se eble per bildoj, la praktikajn higienajn aparatojn, ĝiajn aplikojn k zorgojn. Tiu ĉi punkto estas unu el la plej utilaj por verdikti (? Red.) la oftajn malsanojn. 4. G r a v e d i ĝ o : esploro de ĉiuj pli bonaj procezoj k klarigo de ĝiaj aplikoj. Konsili pri la specialaj atentoj evitante tiel viktimojn de la malsperto. Indiki adresojn de tiaj vendejoj. 5. M o r a l o : racie k ne instinkte utiligi la materialon k konsilojn de l' aŭtoroj.

Vastan aprobon

trovis nia decido aperigi "S-ulo"n sur

12 paĝoj ĉiusemajne

sen plialtigo de l'abontarifo. Sed nia kondiĉo por pravigi nian agon, ankoraŭ ne estas plenumita: Post nur 6 semajnoj okazos la Leipzig-a Kongreso — 6 semajnojn vi agu, agadu k pensu konstante, ke "S-ulo" bezonas almenaŭ

4000 abonantojn!

Ne trouzi la aplikadon de tiuj bonaj efikoj; aliel oni fariĝas pli sklavo de si mem ol antaŭe, ktp.

Jen, pri kio la mondo preferas aŭdi diskutojn aŭ legi en la kolonoj de "S-ulo"[1]! Kaj por scii, ĉu mi pravas aŭ ne, mi petas la gelegantojn sendi al la redaktejo almenaŭ deziresprimojn pri la enkonduko de seksa eduko en nia kultura organizo.

S o a r e s (6727).

[1] Ni jam posedas manuskripton tiuteman de K-do d-ro Fiŝer por eldono ĉe la SAT-kooperativo. — R e d.

KIA DEVAS ESTI MIA EDZINO?

La vivo estas ĉeno da gravaj problemoj, kiujn la homo devas peni solvi unu post la alia. Inter ĉi tiuj problemoj, de la 20-a ĝis la 30-a vivjaro, same por la virino kiel por la viro, troviĝas la edzeco. Grava afero, kiu kreas ĉu la feliĉon, ĉu la malfeliĉon por tuta vivo.

Ĉiu sezono de la homa vivo havas siajn proprajn kaj specialajn bezonojn: la mamsuĉulo bezonas la patrinan bruston, la infano kaj la junulo la amikecon, la ludojn, la ĝojon kuri, salti ktp. Sed la homo, pli malpli frue post la 20-a vivjaro, ne trovas sufiĉon en la supre menciitaj amuzoj; li ja estas plenkreska, li ne povas ludi kiel infaneto, li bezonas iom pli, li bezonas la amon, t. e. la virinon. Kaj jen la problemo: Kia devas esti mia edzino?

K-do "Kozako", en "S-ulo" n-o 240, bone klarigis, laŭ siaj, verdire, kozakaj vidpunktoj, kiel devus esti SAT-anoj geedzoj. Mi ne estas kozako, mi estas eble iom pli malforta ol vi, kara K-do, sed mi povas diri, ke mi estas iom pli romantika. Vi loĝas en lando, kie regas la libero, mi, male, loĝas, kie ĉio regas krom la libero. La leĝoj de mia lando ne permesas la eksedziĝon. Pro tio mi diris, ke la edzeco kreas la feliĉon aŭ la malfeliĉon por la tuta vivo, kaj ankaŭ pro tio miaj opinioj devas esti tute nesimilaj al tiuj de alilandaj K-doj.

La virino estas por mi la ĉefa kreaĵo el la naturo. La viro posedas la forton, la virino la belon. La edzino devas esti bela, ĉarma, ĝoja kaj milda: ŝi devas esti por la viro ne la ino, sed la amikino, la kamaradino kaj super ĉio alia la patrino de siaj infanoj. Por mi ne havas specialan intereson, ĉu ŝi scias rajdi, pafi, naĝi, skermi, skii aŭ kuradi. Mi ne deziras, ke mia kamaradino estu atletino, mi nur deziras, ke ŝi estu mia plej amata amikino.

Johano Jakobo Ruso (fr.: J. J. Rousseau) diris: "La plej antikva el ĉiuj socioj, kaj la sola natura, estas tiu de la familio[1]".

Mi konsideras do la edzinon ne nur kiel amikinon de la viro, sed ankaŭ kiel ĉefan gvidanton en la familio. La viro kreas ĉi lastan, sed nur la virino ĝin kondukas tra la rekta vojo de amo kaj de feliĉo. Estas ŝi, kiu edukas kaj instruas la infanojn.

Ĉu la instruistoj? 90% el la homoj ne scius legi, se ne ekzistus la patrinoj. Kiom da infanoj pretus aŭskulti dum ses aŭ sep horoj homon, kiu laŭ iliaj infanaj pensoj rakontas nur sensencaĵojn, se ne estus la kisoj kaj karesoj de la patrinoj?

Mi mem rememoras, kiam mi estis ses- aŭ sepjara, ke mi malakceptis plue viziti lernejon, plendante, ke mi neniam scipovus dividi. Mia bona patro konsilis, karesis kaj finfine batis min, por ke mi denove ĉeestu la lernejon. Kaj estis mia patrino, kiu montris al mi, kiam mi plorante serĉis la dolĉan rifuĝejon de ŝiaj brakoj, la vojon al lernejo: Ŝiaj kisoj estis pli dolĉaj ol la batoj de mia patro; mi denove ĉeestis la lernejon kaj, iom post iom, mi lernis dividi. Do, ĝuste pro tio, mi kredas, ke la edzino devas esti klera kaj sprita, samtempe gaje kaj bonanima.

Pri la mono, laŭ mia opinio, ĉe vera amo ne ekzistas nek povas ekzisti vio nek mio, ĉar ĉio devas nepre esti nio.

La amo kreas kaj detruas sklavecon. La viro, sklavo de la virino, la virino, sklavino de la viro, jen la ĉefa deziro de geamantoj. La lipoj de la virino kaj la brakoj de la viro estas la plej dolĉaj ĉenoj.

Tion mi opinias pri la edzino kaj edzeco.

M i l d a K a t a l u n i o, Barcelono, 12. majo 1929.

[1] La fama filozofo plene eraris tiurilate, kiel tion pruvis la laboroj de modernaj etnografoj. — E. L.


SENNACIULA SPORTA PAĜO

Kompilanto: Ad. Wendt, Leipzig O 27, Lange Reihe 11-a (Germ.)

KIAL NUDKULTURO?

Ekskribante mi bone konscias, ke estas iom riske, paroli inter SAT-anoj pri tiu ĉi temo, ĉar granda parto el la SAT-anoj ne jam sukcesis liberiĝi de la burĝaj antaŭjuĝoj en tiu ĉi rilato. Sed ĉiurilate kaj ĉefe morale ni devas rompi kun la tradicio.

Unue do mi demandas, ĉu iu infano tute el si mem hontas pri sia korpo? Tute ne. Sed oni instruas jam al la malgranda infano, ke ĝi devas honti, kaj pro tio ni opinias, ke estas natura sento. Ĉefe ankoraŭ estas la burĝa edukado kaj la eklezio, kiuj diras al ni, ke ni devas honti pri la nuda korpo kaj ke ĝi estas senmorala. Bedaŭrinde nur estas, ke multaj gelaboristoj, malgraŭ sia eksiĝo el la eklezio kaj aparteno al laboristaj partioj kiel aktivaj membroj, ne trovas la forton aŭ eĉ ne volas liberigi sin de la burĝa moralo. La eklezio rigardas la nudan korpon, kvankam "kreita de dio kiel majstra verko", kiel malbonaĵon kaj senmoralaĵon, kaj multaj liberpensuloj ankoraŭ samopinias, ĉar malgraŭ la eksiĝo el eklezio tiurilate ankoraŭ havas kristanan pensmanieron.



Sed nun al la demando: Kial nudkulturo? Nu, ĉefe mi aprobas ĝin pro sanecaj kaŭzoj. La korpo bezonas nudbanadon kaj aerbanadon. Kiu jam foje estis tute nuda dum varma tago en la libera naturo, tiu scias, kiom tio bonefikas kaj kiom libere oni sin sentas. La plej bona pruvo pri la valoro de la nudbanado estas, ke tiam la korpo ĉie bruniĝas, dum en banpantaloneto (ĉe germanaj gejunuloj progresemaj nomata "kulturĉifono") nur ĉe la nekovritaj partoj de la korpo. Ankaŭ en akvo estas pli sanige resti sen banpantalono: oni pli bonfartas kaj malpli facile malvarmumas.

Nu jes, diros parto de la Gek-doj, vi ja pravas tiurilate. Sed kiam ambaŭ seksoj estas kune, tiam per la nuda vido de la alia sekso la homoj sekse estas ekscitataj. Nu, tio ne estas fakto ĉe normalaj homoj. La kuna nudbanado tute ne ekscitas la seksajn sentojn, ĝi eĉ kvietigas ilin; oni sentas sin pli interligata kun la naturo. Sincereco devas regi inter la seksoj kaj nudbanado apartenas al ĝi. — La belvestitaj virinoj en la dancejoj kaj kafejoj de la urboj certe pli ekscitas la seksan senton kaj voluptemon de la viroj per siaj profunde dekoltitaj vestaĵoj, silkaj ŝtrumpoj ktp.

Laŭ mia scio en Sovetio oni jam aprobas nudbanadon flanke de la registaro kaj ĝi estas pli ĝenerala ol en aliaj landoj, kie la koncernaj unuiĝoj ofte estas persekutataj. Ni SAT-anoj el la tuta mondo almenaŭ estu sinceraj ankaŭ tiurilate, estu batalantoj kaj rompu kun la tradicio. Ni antaŭenpaŝu al libera pensmaniero!

Sennaciulino (2055).

SPORTULOJ KAJ LA 9-a SAT-KONGRESO

Jam en la antaŭlasta "Sennaciula Sporta Paĝo" ni informis pri fakkunsido de sportuloj okaze de nia 9-a Kongreso en la Laborista Gimnast- kaj Sportlernejo, Leipzig, Fichtestrato 32—34. Estas konate, ke nia lingvo jam estas tre disvastigita en sportulaj rondoj kaj eĉ oficiale agnoskita. Do nia kunsido altiros atenton de gvidantaj instancoj de l' laborista sportmovado. Tamen ni ne kontentiĝu pri niaj ĝisnunaj atingoj, sed preparu nin por novaj elpaŝoj. Al tiu celo servu ankaŭ nia fakkunsido. Por doni al niaj K-doj la eblecon, jam nun prepari sin al aktiva kunlaboro, ni publikigas la provizoran tagordon de la kunsido:

Sportula Fakkunsido, okazonta je la 19-a horo de la 6. de aŭgusto en la Laborista Gimnast- kaj Sportlernejo en Leipzig

1. Raporto de la provizora Sporta Komitato — K-do Wendt.
2. Raporto pri la stato de la esp-a movado en la diverslandaj sportrondoj.
3. Diskuto pri la raportoj.
4. Elekto de Sporta Komitato.
5. Sportlingvaj demandoj.
6. Estontaj taskoj.

Ĉefe ni atentigas pri la dua punkto de la tagordo. Ĝis nun la stato de la disvastiĝo de esperanto en sportaj medioj nur estas malklare konata. Laŭŝajne nur en Germanio, Finnlando kaj proksimume ankaŭ en Sovetio estas konstatebla pli granda disvastiĝo de esperanto en la sportmovado. Pri la stato en Germanio eĉ ekzistas tute fidinda statistiko. Sed jam nun montriĝas, ke la simpatio de la sportuloj al nia afero ne nur estas surpapera, sed elkora. Pro tio necesas koncentrigi niajn fortojn kaj altiri novajn. Tial estas rekomendinde, ke niaj ĉiulandaj LEA-oj zorgu, ke ili estu ankaŭ reprezentataj en la Sporta Fakkunsido, kaj ke el ĉiu lando almenaŭ unu K-do prezentu al nia kunsido la deziratan raporton. Ne nepre necesas, ke la raportanta K-do estu aktiva sportulo, sufiĉas, ke li havu la firman volon aktive kunhelpi al la progreso de la afero. Dezirinde ankaŭ estus, ke oni jam nun faru proponojn al la Sporta Komitato, por ke ĝi havu la eblecon esplori ilian taŭgecon aŭ proponi sur ilia bazo pli taŭgajn. Do resume: Preparu vin por partopreni la fakkunsidon de la sportuloj okaze de nia 9-a.

Sporta Komitato de SAT.

NÜRNBERG

Nur ankoraŭ malmultaj semajnoj disigas nin de la 2. Asocio-festo de Laborista Gimnast- kaj Sportasocio de Germanio, okazonta de la 18. ĝis 21. julio 1929 en Nürnberg. Pli ol mil funkciuloj febre laboras, por fari la lastajn preparajn laborojn. Ankaŭ nia Nürnberga LEA-grupo disponis sin al la Organiza Komitato kaj transprenis laborojn, por tiel kunhelpi por ke la festo estu plensukcesa. Tiaj festoj de la amasoj estas la plej bona grundo por ampleksa propagando de nia idealo. LEA por germanlingvaj regionoj pro tio presigos specialan flugfolion, kiu estos disdonata en 35 000 ekzempleroj. Sed tio ne sufiĉas, ni esperantistoj krom tio devas montri nian aktivecon. Do senprokraste aliĝu al la festo kaj tuj informu nian peranton en Nürnberg (K-do Ch. Wolfrum, Nürnberg, Bauernfeindstr. 53). Nepre portu la esp-an insignon sur la sportvestaĵo. Mendu belaspektan surkudreblan insignon ĉe la Sporta Komitato de SAT (K-do Wendt), kiu vendas ĝin je tre modera prezo de 0,35 mk.g. Por plisimpligi la pagadon, almetu la sumon en poŝtmarkoj.

Ĝustigo

En la noteto "Ni ne blufu!" (vidu n-o 240) estiĝis malklareco en la lasta frazo de la respondo de K-do Klatil, ĉar al la kompostisto du linioj glitis sub la tablon. Do la koncerna frazo devas teksti: "Laŭ mia opinio iu membro aŭ intence aŭ neintence en la ĉeesto de iu kompetentulo de ASKÖ fanfaronis kaj tiu kompetentulo ĝin konsideris serioza."

TRA ESPERANTIO

MODELA KORESPONDADO

Laŭ la speciala peto de kelkaj K-doj ni publikigas ĉi sube modelon de letero, ĉar efektive multaj SAT-anoj, ankaŭ lab. esp. rondoj, kolektivoj ktp. ne scias, kiel ili trafe kaj laŭcele aranĝu sian korespondadon. Red.

Letero de kolektivo A. el D. al SAT-rondeto en N.

Karaj K-doj!

Jam kelkaj tagoj pasis, de kiam ni ricevis vian multe atenditan, interesan leteron. Pro ĝi ni kore dankas al vi. La priskribo pri via grupo estas bona. Kompreneble ĉe ni la kondiĉoj por propagandi esperanton kaj por varbi novajn adeptojn, ankaŭ por kunveni, estas multrilate diferencaj je viaj.

Nia urbo estas tre granda kaj fabrikoriĉa. Multaj industriaj branĉoj donas al miloj da laboristoj laboron kaj vivrimedojn. La laboristoj estas organizitaj je proksimume 55% en sindikatoj. Pli malgranda kvanto ankaŭ membriĝis ĉe diversaj laboristaj partioj. Por sin okupi pri kulturaj bezonoj, restas al ili tial tre malmulte da tempo. Kultura movado apenaŭ tuŝas ilian spiriton. Liberigite en la vesperoj el la fabrika laboro, ili estas devigataj ĉeesti sindikatan aŭ partian kunvenon, aŭ ili vizitas diversajn distrejojn, prefere kinon.

Tamen nia movado faris ĉiam iagradan impreson al la laboristaro. Ĉar dum manifestacioj kaj amaskunvenoj ĉiuspecaj ni neniam forgesis prizorgi la varbadon. Ni faris grandajn afiŝojn; ni disdonis flugfoliojn kaj vendis kurslibretojn laŭ niaj fortoj.

Fakte kelkaj pli seriozaj laborkolegoj estis allogataj tiele kaj ankaŭ per nia persona interparolo kun ili en la laborejo kaj kunvenejo. Tiel nia kolektivo kaj entute la laborista esperanta grupo en nia urbo konsistas el pensemaj, kleriĝemaj laboristoj el diversaj industriaj branĉoj. Ankaŭ kelkaj oficistoj estas en nia grupo, kiuj dungiĝis ĉe kontoroj kaj bankoj. Same kelkaj fervojistoj kaj poŝtistoj troviĝas inter la membraro. Kamparanoj ne estas, kio estas tre komprenebla, ĉar la kamparo komenciĝas nur je distanco de 20 ĝis 25 kilometroj for de nia urbo.

En nia kolektivo, kiu korespondas kun vi, partoprenas nur industri-laboristoj, unu fertornisto, unu rabotisto, unu meblo-lignaĵisto, du mekanikistoj, unu elektro-muntisto kaj unu literfandisto.

Ni ĉiuj interkonatiĝis nur per esperanto, same kiel ni nun perletere konatiĝas kun vi kaj viaj vivkutimoj kaj laboroj. Certe vin multe interesos ekscii, kiel ni organizas niajn esperantajn kunvenojn kaj kiel ni sukcesas interesi la K-dojn vizitantaj la grupkunvenojn. Tial ni prezentas al vi skizon pri nia lasta kunveno: Unue, je la 20½-a horo, oni aranĝis kotizpagadon ĉe la kasisto kaj reklamis pri la literaturo elmetata en ĉiu kunveno sur speciala librotablo. Poste, je la 21-a la kunveno estis malfermata. La sekretario legis la protokolon de l' antaŭa kunveno, kiun ĉiuj ĉeestantoj aprobis. Tiam K-do E. faris paroladon pri la temo "Alkoholo kaj laboristaro". Li parolis proksimume 40 minutojn. Sekvis tre vigla debato, en kiu partoprenis dek K-doj. Ankaŭ la komencantoj, kiuj ĉeestis, komprenis tre multon, ĉar ili tre atentis, kaj la temo interesis ĉiujn.

Poste ni decidis ĉesigi la diskutadon kaj prokrasti ĝian finon por venonta kunveno, ĉar ankoraŭ kelkaj K-doj deziris paroli. Sed la progresinta tempo ne permesis plilongigi la debaton en tiu ĉi vespero. La sekretario utiligis la lastajn 20 minutojn por konigi diversajn leterojn, paroli pri aranĝo de propagandvespero kaj aliaj grupaj aferoj. Je la 23-a horo ĉiuj foriris daŭrigante la diskuton antaŭ la pordo. Neniu parolis la nacian lingvon, eĉ ne la komencantoj, kiuj volis montri, ke ili profitis iom da scio en sia kurso.

Nun, antaŭ ol fini, ni volas fari al vi diversajn demandojn kaj petas ilin respondi kiel eble plej precize. Ni volus scii 1. ĉu inter viaj rondetanoj troviĝas senlaboraj K-doj? 2. ĉu multaj inter ili abonas "S-ulo"-n kaj "La Nova Epoko"-n? 3. ĉu vi povus sendi al ni por ekspozicio ilustritajn gazetojn kaj ĵurnal-numerojn, en kiuj aperis priesperantaj notoj? 4. kiom da salajro laborakiras metallaboristo en viaurba fabriko? 5. ĉu vi bonvolos sciigi al ni, kiom oni ĉe vi devas pagi por bona poŝhorloĝo fabrikata en via regiono?

Esperante, ke vi skribos al ni krom pri tiuj punktoj ankoraŭ pri multo alia interesa, same kiel en via lasta letero, ni sendas al vi nian fratecan, SAT-anecan saluton. (Subskriboj.)



Originala grandeco de la Kongresinsigno.

Ĉiu kongres-aliĝinto, kiu ne povos veni al la 9-a SAT-Kongreso, senpage k afranklibere ricevos post finiĝo de la Kongreso la kongresan insignon (kiu estos el metalo, do valora memoraĵo) k la programlibron en amplekso de 48 paĝoj.

Tuj kongresaliĝu!

PRI INFANA KORESPONDADO

Neniu kontraŭdiros, ke esp-o akcelas edukadon de nia infanaro en la spirito de l' vera kolektivismo kaj internaciismo. Ĉiuj proletaj infanoj, kiuj jam aliĝis al internacia infana movado, sentas sin parto de grandega internacia proleta familio.

Bedaŭrinde ni devas konstati la fakton, ke internacia infana interligo disvolviĝas ne tiel sukcese, kiel ni volus, eble nur pro tio, ke en niaj proletaj presorganoj oni ne trovas adresojn de infanoj, kiuj deziras korespondi. Estas tute prava K-do Tilin, kiu en n-o 236 de "S-ulo" skribas pri foresto en "S-ulo" de anoncoj pri infana korespondado. Kaj ni devas aldoni, ke tiuj tre malmultnombraj anoncoj de sovetiaj infanoj, kiuj aperas iafoje en "S-ulo", ne alportas deziratajn rezultojn. Tion povas pruvi nia propra sperto.

En n-o 227 de "S-ulo" aperis granda infan-anonco de nia kolonio kaj rezulte estis ricevita nur unu poŝtkarto el... Vjatka (Sovetio). Tiam vole nevole mi devis min turni al neŭtrala gazetaro, kie oni povas renkonti pli multenombrajn anoncojn kaj el la plej diversaj malproksimaj landoj, ekz. en "Esperanto-Junularo". Finfine estis starigita senpera interligo kun 13—14-jaraj gelernantoj de germanaj kaj svedaj popollernejoj — gefiloj de oficistoj kaj fabrikaj laboristoj. Sed la ideologia valoro de tiu ĉi korespondado estis tre duba. Unue, la infanoj tute ne volis korespondi kolektive; due, ili preferis korespondi sur ilustritaj poŝtkartoj kaj trie, ili preskaŭ ĉiam skribis pri siaj familioj, neniam tuŝante temojn pri la vivo kaj laboro de infanoj ĝenerale. Laŭ miaj observoj kaj impresoj germanaj gelernantoj korespondis ekskluzive por kolekti iajn aĵojn por siaj albumoj.

Samtempe en nia nacia infana gazetaro ni povas renkonti multnombrajn pruvojn, ke internacia infana interligo kreskas kaj fortiĝas, sed... ne per esp-o. Ekzemple, en la unuamaja n-o de ukrainlingva infangazeto mi trovis kelkajn tre riĉenhavajn leterojn de junaj pioniroj el Germanio, Usono kaj eĉ el Nova Zelando, kiuj helkolore pentras antaŭ ni diversajn momentojn el infana vivo en kapitalistaj landoj.

Esp. movado en pioniraj organizoj kaj ĝenerale inter infanoj estas tre malvigla, kaj ĝi restos tia, ĝis ni pruvos, ke esp-o estas fortega ilo por infanara interproksimigo. Ĉiuj aktivaj SAT-anoj devas akceli starigon de infanara interligo, pridiskutante tiun ĉi problemon sur la paĝoj de "S-ulo".

N. Aleksandrov (5875).

KORESPONDEMULOJ

Krom multaj salutleteroj al lab. organizoj, en lasta tempo amasiĝis petskriboj pro korespondperado. Volonte mi helpus tiurilate al ĉiuj Gek-doj. Sed pro la nunaj preparaj laboroj por la 9-a SAT-Kongreso, kiuj parte ankaŭ kuŝas sur miaj ŝultroj, bedaŭrinde tiaj petoj devas toleri prokraston. Efektive la petskriboj amasiĝas. Mi do avertas, ke oni nun ne sendu al mi tiajn petojn, ĉar ili tutcerte ne estos plenumeblaj.

O. Bässler, Leipzig.

9-a Kongreso de SAT

en Leipzig (Germ.) 4.—10. aŭg. 1929

11-a listo de aliĝintoj

466 Adolf Neuwirth, Bregenz, Aŭstr. 7851
467 Adalbert Domke, Donnerau, Germ. 13290
468 E. Rosenfelder, Rüsselsheim, Germ. 13722
469 Hermann Mocker, Oelsnitz, Germ. 5968
470 W. Gerstenberger, Oelsnitz, Germ. 5979
471 Hans Künzel, Oelsnitz, Germanio 3111
472 Otto Behrendt, Berlin, Germanio 8698
473 Johannes Voigt, Oberfrohna, Germ. 3469
474 Adolf Waldmann, Bremen, Germ. 11761
475 Fritz Köcher, Leipzig, Germanio 75
476 Donath, Leipzig, Germanio 13037
477 Albert Weinhold, Leipzig, Germ. 2568
478 Al. Klimŝa, Dolni Liŝtna, Ĉekosl. 1626
479 Piere Grignard, Bruxelles, Belgio 1854
480 T. St. 14674
481 Karl Falmer, Stettin, Germanio 14732
482 Teodoro Eremeev, Moskvo 14740
483 Hermann Platiel, Leipzig, Germ. 3020
484 Johano Palkin, Moskvo 14406
485 Agnes Chisholm, Glasgow, Angl. 14768
486 John Steele, Rochdale, Anglio 13460
487 Wiliam Smith, Brierfield, Anglio 9371
488 Frederiko Deiters, Kassel, Germ. 264
489 Ad. Rodriguez, Baracaldo, Hisp. 6576
490 Esteban Munoz, Baracaldo, Hisp. 13993
491 Esteb. Cortazar, Baracaldo, Hisp. 8602
492 Angel Uribe, Baracaldo, Hispanio 8600

Proponoj al la 9-a Kongreso

(Daŭrigo)

6.

Konsiderante, ke SAT ne estas matura por akcepti nun ian programon kaj ke dume la Statuto de SAT plene sufiĉas por ĝia praktika laboro, ni proponas malakcepti ian ajn projekton de programo kaj ĉesigi ĉian diskutadon pri la demando.

Je la nomo de l' SAT-anaro en Niĵnij-Novgorod: Hermann Konovalov (641), Vjaĉeslav Kalaŝnikov (1125).

7.

Mi proponas, ke faka kunsido el spertuloj kaj interesuloj pri stenografio post prepara pridiskuto prezentu al la Kongreso plej bonan stenografi-sistemon rekomendante ĝian oficialan akcepton.

F. Viŝnjakov (6532), Novosibirsk.

8.

Mi proponas 1. organizi ĉe SAT specialan infansekcion, kiu havu celon kolektadi kaj komuniki adresojn de esperantistaj infanoj kaj statistiki ilin; 2. intensigi eldonadon de porinfana literaturo kun plej interesa enhavo kaj plej facila lingva stilo. — Motivigo: En Sovetio esp-o rapide disvastiĝas en infana medio malgraŭ multaj malfaciloj kaj manko de speciala porinfana facila literaturo. Infanoj ĉefe interesiĝas pri korespondado kun samaĝuloj el diversaj landoj. Sed tiu lasta estas malfacile organizebla sen infana adresaro.

Mik. Popov (13672).

9.

Mi proponas presigi en ĉiu n-o de "S-ulo" la nomojn de Gek-doj, kiuj nove membriĝos ĉe SAT. Motivigo: Ĉiu SAT-ano tiel havos eblecon koni la aktualan staton de SAT.

A. Klimov, (9767).

LA VOJO LIBERA

por partopreno ĉe la 9-a SAT-Kongreso. Ĉar venis plendoj el kelkaj regionoj, ke la K-doj havas malhelpojn por ricevi la germanan vizon, parte por ricevi pasporton, la K. K. turnis sin al la policoficejo de Leipzig k ricevis sekvantan dokumenton:

Polica Prezidejo
Leipzig

Al la organiza komitato de l' 9-a SAT-Kongreso enmane: S-ron A. Wendt

Per tio estas dokumentite, ke en aŭgusto k. j. en Leipzig la tutmonda asocio de la Laboristaj Esperantistoj okazigos sian kurantjaran Kongreson k ke kontraŭ tio neniaj policaj duboj (malhelpoj) ekzistas.

S-ron ..... responde al sia petskribo la restado en Leipzig estos permesata por 2—3 semajnoj, se la aliaj pasportleĝaj kondiĉoj estas plenumitaj. — La polic-prezidejo.

Por eviti ĉiajn miskomprenojn, ni presigas ankaŭ kliŝon de la originalo-dokumento:

Polizeipräsidium Leipzig
Wächterstr. 5. Verkehrsabteilung: König-Johann-Str. 19
Fernsprech-Nr.: 72321 / Hausanschluß-Nr.:
Postscheckkonto: Leipzig Nr. 66202
Bankkonto: Stadtbank Leipzig Nr. 1740
Bankkonto: Sächsische Staatsbank
Geschäftszeit: 8—1 Uhr / Kassenzeit: 9—1 Uhr
Registrande: A.R.I 867/29.
In Eingaben und bei Geldsendungen ist dieses Aktenzeichen anzugeben!

An das
Organisationskomitee des 9. Sat-Kongresses,
z.H.d. Herrn Ad. W e n d t ,
L e i p z i g .

Leipzig, den 8. Juni 1929.

Es wird hierdurch bestätigt, daß im August ds.Js. in Leipzig der Weltverband der Arbeiter-Esperantisten seinen diesjährigen Kongreß abhält und daß hiergegen keinerlei polizeiliche Bedenken bestehen.

Herrn Emmerich F ö l d i wird auf sein Gesuch der Aufenthalt in Leipzig auf 2 - 3 Wochen bewilligt werden, wenn die sonstigen paßgesetzlichen Voraussetzungen erfüllt sind.

Das Polizeipräsidium.

RADIO-AMATOROJ!

Aŭskultu! Pri la 9-a SAT-Kongreso!

La 12-an de julio, je 18.05-a horo (mezeŭropa tempo) raportos prof. d-ro Dietterle esp.-lingve en la sendstacio Leipzig sur ondolongo 361,9 pri la preparaj laboroj por la 9-a SAT-Kongreso. Nepre aŭskultu k poste skribu al MIRAG, Leipzig (Germanio), esprimu dankon por disaŭdigo de la prikongresa raporto k deziresprimu, ke dum la kongresdaŭro vi ĉiutage povu ĝui perradian raporton pri la kongresaj laboroj.

K. K.

ESPERANTO EN LA SVEDA PARLAMENTO

La 24-an de aprilo disvolviĝis en la sveda parlamento granda primondlingva debato, okaze de pritrakto de subvencipeto por aranĝo de esp-aj kursoj. La propono prezentita de K-do Ernst Erikson, trovis la principan aprobon de la Ŝtatkomitato. Sed la proponita sumo de 4600 sv.kronoj estis malaltigata ĝis 2900 kr. k restis tiel parlamenta decido. En la debato mem parolis iu s-ro Jönsson kontraŭ la subvencio, uzante la malnovajn sufiĉe konatajn argumentojn. Respondis al li K-do Eriksson per longa, bone dokumentita parolado, en kiu li i. a. citis, ke dum lasta vintro 235 rondoj studis esp-on, sed nur 148 anglan lingvon, dum en 1924 studis nur 22 rondoj esp-on, sed 104 anglan lingvon.

DORTMUND-A KONGRESKARAVANO

por orienta Rejnlando, Ruhrregiono k. Vestfalio ekveturos de Dortmunda Sudstacio (piedire 15 min. de ĉefstacio sabaton noktmeze je la 0,07-a. Alveno en Leipzig: Dimanĉon 8,50-a. Veturprezo: 15 mk. (rabatita por karavanoj). Interesuloj tuj interrilatu kun la komisiito: A. v. d. Heid, Dordmund, Junggesellenstr. 9.

Sovetianoj — salutoj al RFB.

Kvankam la malpermeso de la germana RFB. (asocio de ruĝaj frontbatalantoj) estas konata en tuta mondo, ankoraŭ ĉiutage alvenas multaj salutleteroj, kartoj k. a., direktataj al RFB. Tiuj leteroj nun estas vanaj, k efektive ne eblas iel respondi ilin. Je nomo de iamaj ruĝaj frontbatalantoj de Okcident-Saksio (Leipzig) mi kore dankas por ĉiuj sendaĵoj amase alvenintaj k promesas, ke la interrilatoj oficiale ekdaŭros, kiam la cirkonstancoj estos pli favoraj. Bonvolu pardoni, ke per tiu vojo ni respondas, sed momente alia vojo ne estas ebla. Precipe la sovetiaj Gek-doj devas konsideri la fakton, ke momente leĝa kompartio en Germanio pli efike povas labori por la revolucia laborista movado ol neleĝa RFB. ...

O. Bässler, Leipzig.

En viaj korespondaĵoj al la Administrejo ĉiam citu vian membro-numeron

En kelkaj vortoj . . .

Naĝanta SAT-rondo

El la anoj de "Internacia grupo de esp. maristoj" nun troviĝas K-do Joh. Jelen sur belga ŝipo "Van", vojo New Castle, Autofagasta, Aleksandria; K-do Georgo Tassin sur belga ŝipo "Mambiĥa" Port Said, Mombasa, Matadi, Kapurbo; K-do A. Nops sur belga ŝipo "Londonier" Montevideo, Buenos-Aires; K-do Niklas Vulkan sur angla ŝipo "Cannbrian Empress", Montevideo, Buenos-Aires, Rosario; K-do V. Kolk sur angla ŝipo "British Union", Rotterdam, Tampico; K-do M. Karniol sur angla ŝipo "Eastborough", Donkirke, Buenos-Aires, Rotterdam; K-do K. Malina sur angla ŝipo "Maid of Corfu", Donkirke, Pireo, Aleksandria, Konstantinopolo, Braila; K-do Z. Weiss sur angla ŝipo "Main", Cardiff, Rio de Janeiro, Montevideo, Bahia Blanca, Rotterdam; K-do Paolo Majsuk sur franca ŝipo "Refrigerant", Port Said, Bombe, Kalkuta, Ŝanĥajo.

K-doj en havenurboj, kaptu la okazon k vizitu ilin! (13 066)

Esperanto ĉe filmo! Grava sukceso!

En prezentata en Rostov (Don) filmo "Komercistoj de gloro" ("Mortintoj ne revenas"), produktita de "Meĵrabpomfilm", estas montritaj scenoj, dum kiuj manifestaciantoj portas lignoŝildojn kun esp-lingvaj subskriboj k krome estis uzataj afiŝoj skribitaj en esp-o. Do . . . esp-o penetras en sovetian filmon.

La verkoj de S. Lagerlöf en esperanto

Esp-o pli k pli okupas en Svedio la publikan vivon. Jus ni legas en la taga gazetaro, ke Selma Lagerlöf, la fama romanverkistino, distingita per la literatura Nobel-premio, intertraktas kun svedaj esp. asocioj pri la traduko de siaj verkoj. Esp-o estos la tridek-sepa lingvo, en kiun estos tradukataj la multnombraj verkoj de l' aŭtorino.

Fruktoj de peresperanta laboro


Aŭtune aperos "La Mensogo kaj la Malamado en Edukado" verkita anglalingve de SAT-ano 488. En antaŭparolo oni povas legi: "La kolekto de tiu ĉi verko neebliĝus sen helpo de kolegoj . . . esperantist-instruistoj alilandaj." En piednotoj "S-ulo", T.E.P.S., "Vojo de Klerigo" ofte estas menciataj. Instruon de esperanto la aŭtoro rekomendas inter aliaj kuraciloj kontraŭ la ŝovinismo en la lernejo.

La 14-an de julio okazos en Landskrona, urbeto ĉe sud-okcidenta bordo de Svedio, tre oportune atingebla de Kopenhago, esperanto-tago.

Dum kunveno de la aŭstria sekcio de Mondjunular-Ligo en Waidhofen okazis parolado pri esp-o. Laŭ decido de la Plenkunveno la membroj aprobis okupadon pri esp-o.


PRI LA ANTAŬKONGRESO EN REGENSBURG

Vizitontoj estas petataj resendi la ricevitajn anoncilojn aŭ anonci sin poŝtkarte. Bonvolu vin anonci sufiĉe frue k skribi la adresojn tre legeble. Al ĉiu anonciĝanto ni sendos senpage tre belan kolekton da ilustritaj poŝtkartoj de Regensburg. En preparo estas kvarpaĝa kongres-programo. Via devizo estu: Veturonte Leipzigon ni vizitu la Antaŭkongreson en Regensburg. Venu multnombre! Senkoste vi ricevos noktrestejojn k tagmanĝon. Mendu prospektojn ktp. ĉe K-do Johann Alzinger, Hauptstr. 16, II, Regensburg (Germ.).



REGENSBURG, la urbo de Antaŭkongreso.

La bildo prezentas la "Ŝtonan Ponton" konstruitan en 1135 kaj la katedralon konstruitan en 12-a jarcento.



REGENSBURG, la urbo de Antaŭkongreso.

La bildo prezentas antikvan pordegon, la "Porta Pretoria". Da tiaj konstruoj ekzistas nur 2 en Germanio.

Plendo

K-do G. Dumont (11 772), Digoin (Francio) deziras scii la motivojn, kial al li ne respondis: K-doj Strojev, Kiev, al kies lasta let. li respondis 20. 2. 29, Karl Ŝvarc, Tomsk, lia lasta resp. 24. marto 29, P. Bartczek, Essen, depost 6. 4. 29, Molaĉev, Krasnoufimsk. Krome li petis regulan koresp-adon, kunsendante laŭstatute internacian respondkuponon, al K-doj De Le Cruz, Madrid, Fade, Vladivostok, Roev, Batum, ĉiuj SAT-anoj. Mi demandis ilin pri soci-politik-ekonomiaj temoj, sed ne ricevis respondon.

LA INTERNACIA TROMPISTO,

pri kies trompagado ni jam informis niajn legantojn en antaŭa n-o, — li priŝtelis per falsita legitimacio la lignaĵistajn sindikatojn en diversaj landoj — estas mezgranda, havas helajn harojn, estas senbarba, la supraj dentoj preskaŭ forestas, aĝo: 30—35 jaroj. Li parolas germanan, francan, skandinavan lingvojn, iomete ankaŭ esp-on (kiu lastan li eble utiligos por friponaĵoj inter esp-istaro). Okaze de renkontiĝo oni tuj arestigu lin. Informojn akceptas: K-do J. Bergmann (1889), Reinowitz 187 ap. Gablonz (Ĉeĥoslovakio) por "Holzarbeiterverband", Gablonz.

TRA LA MOVADO

(Kroniko)

DANZIG. Okaze de la unuamaja tago la sindikato malpermesis al esp-istoj grupan enviciĝon, tial ni propagandis kun grandaj steloj sur stangeto en mano k biciklistoj portantaj afiŝojn sur dorso k ventro kun admono lerni esp-on aŭ kun klasbatalaj frazoj. (2421). — **FINNLANDO. Helsinski.** La gazeto "Työläisnuoriso" (Laborista gejunularo), dusemajna organo de socialdemokrata junularo, enhavas en ĉiu dua n-o esp. fakon. (V. Ahde). — **GERMANIO. Comburg.** Ĉe la loka popolaltlernejo okazas dum la somera periodo ankaŭ esp.kurso kun 12 lern. **Langenberg** (Rhld.). La en pentekosto ĉi tie okazintan renkontiĝon de SAT- k LEA-anoj el Rejnlando-Vestfalio partoprenis pli ol 100 Gek-doj. Notinde estas, ke en la pli proksima ĉirkaŭo de tiu urbeto, konata ankaŭ eksterlande pro sia potenca sendstacio, lasttempe fondiĝis 3 novaj LEA-grupoj: Remscheid, Wermelskirchen, Wiebelskirchen. — **SOVETIO. Niĵnij-Novgorod**[1]. 14. aprilo okazis kunveno dediĉita al memoro de Zamenhof. Raportis K-do Konovalov, deklamis K-doj Belajev k B. Piskunov. Unuamajaj leteroj de Vieno k Leipzig aperis en "Niĵ. Kommuna" (preskvanto 38 mil ekz.). Tiu fakto promesas eblon por aŭtuno organizi kursojn en ĉiuj urbaj kluboj. Same ĝi estis utiligata en Sormovo, Miza, Bogorodsk, Vorsma en la gubernio. Esp. rondeto ĉe Klubo de STS sendis al soveta ekspozicio en Vieno murĵurnalon. La interŝanĝe ricevita letero estis legata dum sindikataj konferencoj. 5. majo ni partoprenis en manifestacio de memvolaj organizoj portante niajn propagand-devizojn k afiŝojn. Ankaŭ dum la tiel finiĝinta Esp.Trisemajno ni laboris

[1] Pro ĝia longeco ni devis tre koncizigi la rap. — Red.

Por la 9-a SAT-Kongreso
Sigelmarkoj: 60 ekz. (1 folio) 0.50 mk. g.
Leterfolioj kun kovertoj: 15 ekz. 0.50 mk. g.
Tuj mendu ĉe: W. Kampfrad, Löbauer Str. 35, Leipzig N 24 aŭ ĉe Adm. de SAT.

laŭ niaj povoj. 12. 5. K-do Piskunov partopr. SEU-konferencon en Bogorodsk, Pavlova distrikto. Depost novembro 28 funkciis jenaj rondetoj (kursoj): ĉe 7-a sov. lernejo (nomo Kropotkin) 3 grupoj el lernantoj de duagrada lernejo, 2 po 15 p., 1 po 30 p., ĉe N Eskorta Bataliono 10 p., ĉe Ŝtata Universitato en Stud.Domo je nomo M. Ladov 15 p., ĉe fabriko Ŝvejprom 15 p., ĉe fabriklernejo en Sormovo 30 p., ĉe junpionira klubo en Sormovo, 12 p., metalista klubo je nomo de Gorki, 16 p., vilaĝo Visokovo 15 p., NKCRK (kooperat.), plenaĝuloj 10 p., junpioniroj 15 p., metalfabr. en Kanavino 20 p., IRH-kurso Kanavino 20 p., telefonfabr. ĉelo je nomo Lenin (Miza) 10 p., 20. sov. lernejo en Miza nedeviga instruo al lernantoj laŭ Rublov en 5-a k 6-a grupoj, 95 p. Post 1. 1. 29 komencis funkcii: IRH-urbkomitato, 15 p., Grupkom. STS, Sormovo, 220 p., Sovet- k komerc-oficista kom., 10 p., N. Radio-regimento 25 p., 10. sov. lernejo je nomo Vorbjov 20 p. Por izoluloj pagata kurso por sindikat-membroj ne havantaj okazon lerni ĉe siaj entreprenoj vekis grandan intereson. Enskribiĝis 137 p. (100 en urbo, 37 en Kanavino). El ili en urbo 40% viroj, 60% virinoj, 12% partianoj, 14% laboristoj, 25% oficistoj. En Kanavino (antaŭurbo): 57% viroj, 43% virinoj, 30% partianoj, 38% laboristoj, 25% fervojistoj. Ili estis organizataj laŭ 3 grupoj en urbo, 1 en Kanavino, dividataj laŭ: a) kiuj tute ne scias fremdajn lingvojn, 44 p., b) kiuj iom scias fremdajn lingvojn 29 p., c) kiuj bone scipovas fremdajn lingvojn — 27 p. En la kursoj studas 3 blinduloj, instruistoj de porblindula lernejo. Preskaŭ en ĉiuj kursoj la gvidantoj estis salajrataj. Sume komencis studi 570 p. en 27 kursoj. Krome en gubernio: Bogorodsk 20 p. (centra kooperativo), Vorsma 5 p., Rabotki — en loka lernejo. En aliaj lokoj laboris apartaj K-doj, sed ne povis malfermi ĝis nun kursojn. 3. 3. okazis komuna konferenco de lab. korespondantoj k esp-istoj, kiu decidis ĉiel helpi al pli granda ol ĝis nun utiligo de esp-o.



En ULM apud Danubo (Donau) okazis fondiĝ-festo de laborista esp. grupo. Tio estas la sukceso de du esp. kursoj gviditaj de K-do 14205. Samtempe oni aranĝis ekspozicion, kiu estis vizitata de ĉ. 300 personoj. La bildo montras al vi la junan k viglan grupon. Sidante en mezo troviĝas K-do Ŝel, estro de la LEA-distrikto.

(Partopr. pli ol 100 p.). Estis sendataj de 1. 10. 28 — 1. 4. 29 al eksterl. 300 let., ricevataj 230. Literaturo estis vendata: lerna — 765 ekz., prop. k esp-lingva 134, alia 486. — 1. 4. 29 SEU havis 76 efektivajn membrojn (67 membrojn-amikojn). 36 SAT-anoj. Abonantoj al "S-ulo" 38.

V. Kalaŝnikov (1125).

Ĉe la neŭtraluloj

En Nanci (Francio) okazis nacia kongreso de la franca societo por propagando de esp-o k tia de ĝia orienta federacio (18. 5.). La festsalono estis ornamita per naciaj flagoj; nur ekstere flirtis esp. standardo, zorge gardata de du trikoloraj flagoj. Interne belega manifestacio de "interna ideo" — orkestro en bluaj kostumoj de l' franca armeo. Ĉe fino oni ludis la nacian himnon — Marsejezon. La kongreson de l' orient-franca federacio ĉeestis ĉ. 50 personoj, 9 aŭ 10 delegitoj. Ankaŭ ĉe l' nacia kongreso estis apenaŭ 10 delegitoj, reprezentantaj apenaŭ duonon de l' membraro. Oni diskutis pri oficiala lingvo: franca aŭ esp-o. Fine oni decidis, malgraŭ ke la plejparto de l' orientaj kongresanoj, eĉ delegitoj, estas germanlingvanoj, uzi ambaŭ lingvojn: fakte oni uzis nur la francan. Oni proponis reorganizon de l' tutmonda esp. movado per kuniĝo en granda organizo (asociaro), ĉe kiu ankaŭ aliĝu la fakaj societoj (laboristaj, katolikaj ktp.). La opinio de iu s-ino estis, ke afableco povas anstataŭi interklasan batalon!

(7369[1])

En la Popolaltlernejo de Wiesbaden (Germ.) okazas kvar kursoj por esp-o. Same okazas kursoj en la urbaj vesperlernejoj de Antverpeno k ankaŭ en la tiea laborista altlernejo.

S-ro Seppik estis subvenciata de la estona registaro por paroli en esp-o pri Estonio en Svedio. Li jam paroladis en multaj urboj de Svedio k faris provlecionojn laŭ la Ĉe-metodo.

MEMORNOTO

Represis el "S-ulo":

Krasni Tid, Iv. Voznesensk, majo. El Hispanio, Tago el Polio (233, 234), Klementi (233); Harthaer Nachr., Harthaer Tagebl., 8. 4., 11. 4.; Planitzer Ztg., 5.4.; Limbacher Tagebl., 25. 4., Kiom da lingvoj estas en Eŭropo?

Priesper. artik. k notojn enhavis:

L'Effort, Lyon, 15. 4., 1. 5.; Le Populaire, Paris, 26. 2.; Bulletin mensuel d'Indre & Loire, Artannes, feb.; Le Combat Syndicaliste, Paris, jan., feb., apr.; L'Avant-Garde, Tours, 13. 4., 11. 5., 18. 5.; La Dépêche, Tours, 17. 4.; Radio-Magazine, Paris, 5. 4.; Labors News, N. Jorko, 4. 5. (mencias SAT, de M. Starr); Signalen, Stokh., 16. 5. (kun detala priparolo de n-o 240 "S-ulo", E. Eriksson); Freie Sportwoche, Leipz., 13. 5. (Wendt); VOKS-Bulteno, Moskvo, esp. resumo en n-oj 15/16; Sächs. Volksblatt, Zwickau, 28. 2., 15. 3.; Muldenthaler Nachrichten, 13. 4.;

[1] Bedaŭrinde nia K-do raportanto, kiu liveris al ni tre ampleksan manuskripton pri supra okazo, forgesis en ĝi sciigi al ni tion, kio povas pleje interesi niajn legantojn: Generala stato de la neŭtr. movado en francio, elmontrita per ciferoj. Aliaj raportantoj ĉe similaj okazoj atentu ĉefe pri tio! — Red.

Ĵus aperis en esperanto
unuakta scenaĵo
PARIZA KOMUNO
elrusigita de K-do Goldfeder, SAT-peranto, Barnaul, Siberio.
Uzebla k rekomendinda scenaĵo.
Ĝia prezo 15 kop.

Rus-esp-a, esp-a-rusa vortaretoj
k kompleta gramatiko (lernolibro)
verkita de K-do Ŝ. Goldfeder, Barnaul.
Ĝia prezo same 15 kop. (80 pĝ.)

Ĉion mendu plej baldaŭ ĉe
"Sibkrajizdat", Barnaul, Siberio
(Siberia land-eldonejo, kiu monsubvenciis la esp. eldonadon).

BALDAŬ APEROS
nova eldono
de antaŭaj
Esperanta Sintakso k Esperanta Vortfarado
sub titolo:
Paul Fruictier
Kompleta Gramatiko kaj Vortfarado de Esperanto
reviziita kaj kompletigita kun helpo de l' aŭtoro de
S. GRENKAMP-KORNFELD
kunaŭtoro de
Plena Vortaro de Esperanto
Grandformata, ĉ. 200-paĝa
Eldonejo:
ESPERANTISTA VOĈO
Jaslo (Pollando)

LA MULTKOLORAJ, ILUSTRITAJ POŜTKARTOJ DE SAT
estas haveblaj ĉe la Administrejo de SAT, Colmstrasse 1, Leipzig O 27.

Volksstimme, Chemnitz, 8 notoj dum apr.; Siegmarer Wochenbl., 8 notoj, jan. ĝis apr.; Limbacher Tagebl., 16., 19. 4.; Planitzer Ztg., 16., 19., 25., 30. 4.; Harthaer Nachr., 2., 3., 5., 12. 4.; Harthaer Tagebl., 3. 11., 16., 25. 4.

Pri 9-a SAT-Kongreso raportis:

Harthaer Tagebl., 5. 4.; Planitzer Ztg., 17. 4.; Waldheimer Tagebl., 17. 4.; Mitteilungen d. Buchdruckerverb., Leipz., 10. 5.

Peresper. materialon presis:

Travail, Lyon, 11. 5.; Krasni Tid, Iv. Voznes., unuamaja eldono, mater. de Batta por 1. 5. kun bildoj ktp.; Der Kämpfer, Chemnitz, 30. 4.; Siegmarer Wochenbl., 26. 2.; Limbacher Tagebl., 16. 4.; Planitzer Ztg., 4. 4.; Slovo .at Stanka, Rostov, 8. 3.; Bolŝevistskaja Smena, Rostov, 1. 5.; Leninskije Vnuĉata, Rostov, 12. 5.

NIA POŜTO

9742. — Ni uzos vian "tagon" okaze kiel felietono.

14 017. — Jes, vi povas alsendi k ni enmetos laŭvice.

H. Garten. — La manuskripto senditа de vi al "A.-E." trovos lokon en "S-ulo".

5296. — Poemojn ni povos enmeti "S-ulo"n nur en tre limigita amplekso. Cetere tiu via versaĵo estas tute ne speciale bona, eĉ iom — banala.

2421. — Legu la "atentigon" en n-o 244, pĝ. 354. Red.

Nekrologo

La 26-an de majo mortis nia plej aktiva k plej perfekta K-do

Erich Bleuel (10 473)

Furiozeganta t. n. "ankaŭ-sporto" de la burĝaro lin mortigis. Ni daŭrigu, kion li celis.

Lab. Esp. Grupo "Ruĝa Espero", Eichgraben.

K * O * R * E * S * P * O * N * D * A * D * O

Unu enpreso: Simpla trilinia anonco kostas 0,50 mk. g., ĉiu plia linio la samon. Ni nur akceptas anoncojn kun samtempa pago.
L = letero, PK = poŝtkarto, PI = poŝtkartoj ilustritaj, PM = poŝtmarkoj, bfl. = poŝtmarko sur bildflanko, kĉl. = kun ĉiuj landoj, esp-aĵo = esperantaĵo.
Ĉiuj petantoj pri korespondado havas la devon, nepre respondi almenaŭ unu fojon al ĉiuj petoj koncernantaj la fakon, por kiu ili sin enskribigis.

ĈEĤOSLOVAKIO

K-do Franz Hoyer (21 j. fraŭlo), Neusattl, 241, ĉe Karlsbad, dez. koresp. kĉl, L, PK, PI, il. gaz.

FINNLANDO

K-do Vilho Seppälä, Muurola, Rov-rata, dez. koresp. kĉl. Resp. garantiata.

GERMANIO

K-do Hans Unger, Helenenstr. 40, Hth., Limbach i. Sa., dez. koresp. kĉl. pri ĉ. temoj.

K-do Oswald Bernhardt, Am Tor, 4, Limbach i. Sa., dez. koresp. serioze pri ateisma, literatura k soc. temoj, precipe kun ekstereŭropanoj.

K-do Herbert Lange, Schützenstr. 14, Limbach i. Sa., dez. koresp. kĉl. pri ĉ. temoj, koncernantaj la infanon, pref. nur kun perfektuloj k kompetentuloj.

K-do Walter Zeitner, Rostocker Str. 6, Berlin, NN 87, ĉe Grahlmann, dez. koresp. kun komencantoj el ĉl.

K-do Georg Kraus, Achwanenstr. 2, Rheingönnheim (Pfalz), dez. interŝ. PI, kĉl.

K-do Hans Hollmann, Heringstr. 3, Bautzen, dez. koresp. kĉl., PI. Resp. garantiata.

K-do Erich Marschner, Bleiche, Nr. 277, Nieder-Oderwitz i. Sa., dez. koresp. kĉl. pri ĉ. temoj, L, PK, PM, PI, bfl. Resp. garantiata.

K-do Alfred Hirsch, Fischerstr. 13, Leipzig, S 3, dez. koresp. kĉl. pri amatorfotografado.

K-do Friedrich Giefer, Eintrachtstr. 23, Mayen i. Rhld. (29 j. fraŭlo), dez. koresp. kĉl., L, PI, bfl.

— 5 K-doj, fotoamatoroj, dez. interŝ. fotobildojn kun ĉl. Gekdoj. Adr.: Ernst Sauerwein, Münchner Str. 80/II., Ingolstadt i Bay.

K-dino K. Heil, Seilerstr. 2-a, Ludwigshafen a. Rh., dez. interŝ. PI, bfl., LEA-gazetojn kĉl.

HISPANIO

K-do Jako Moret, Sto. Sardañola, 22, Barcelona (Sans), dez. koresp. kĉl. pri ĉ. temoj, L.

K-do Hector Ramos, Calle Rouda S. Antonio, 92-3°-2, Barcelona, dez. interŝ. PM, kĉl. per 50 aŭ 100 specoj.

JAPANIO

K-do Ŝindo-Seitaro (SAT, 8812), vojaĝis Eŭropen k petas siajn koresp-antojn atendi la respondon ĝis reveno, espereble en okt.

SOVETIO

K-dino Z. Bitoĉkina, Proletarskaja, 56, Krasnodar, dez. koresp. kĉl. junkomistoj. Resp. garantiata.

K-do Johano Ĉerenkov, Gostorg, St. Slavanskaja, Kab. okr., dez. koresp. kĉl. pri ĉ. seriozaj temoj, L, PK, PI.

— Esp. rondeto ĉe klubo "Ruĝa Milicano", dez. koresp. kĉl., L, PK, PI. Resp. garantiata. Adr.: "Krasnij Milicioner", Krasnaja, 68, Krasnodar.

Adresŝanĝo. — K-do S. Trofimov, Poŝtkesto, 1, Ĉita, Siberio (antaŭe en Nikolsk-Ussurijsk).

K-do S. B. Liberman, ul. Jukovskogo, 24, Odessa, dez. interŝ. seriozan koresp-adon k nacil. gazetojn kĉl. Nepre resp.

K-do Eŭgeno Ŝĉepin (junlab.), 2-a Prudskoj, 35, Barnaul, dez. koresp. kĉl. junularo pri ĉ. t., L, PI, gaz., ĵurn. Resp. garantiata.

K-do N. Pavlov "Okrano", Barnaul, dez. koresp. kĉl., PK, PI, fotojn. Resp. garantiata.

K-dino V. Sviontovska (jun-instruistino), Krestjanskoje, Barnaula distr., dez. koresp. kĉl. instruistaro k junularo pri pedag., politikaj k. a. temoj, L, PK, PI. Resp. garantiata.

K-dino E. Ŝpakovska "Koĵzavod", Barnaul, dez. koresp. kĉl., L, PI, fotojn. Resp. garantiata.

K-dino Blinova, str. Anatolia, 148, Barnaul, interŝ. PI, fotojn kĉl. junularo. Certe resp.

K-do Karl Ŝvarc, Preobraĵenskaja, 21, Tomsk, dez. koresp. pri politiko k komerco. Precipe kun K-doj en Britio, kolonioj k Usono. Interŝ. PK.

K-do P. Tokarev (instruisto), Zatejevskaja str. 6, kv. 3, Tomsk, dez. koresp. kun Gek-doj el ĉl. pri pedag. temoj.

K-do Lomonosov Nikolao, Lagernaja, 136, Slavjanskaja, Kub. okr. dez. koresp. kĉl. pri ĉ. t. pref. sporto, L, PK, PI.

USONO

Adresŝanĝo. — K-do George Johnson (SAT, 13 301), Brooklyn, N. Y., informas siajn amikojn, ke la nuna adreso estas: K-do George Johnson, 62, West. 126 st., New York, City.

Kiu deziras?

1. **por intern. kooperativtago** (6. VII.) ricevi priskribon de nialokaj kooperativoj (stato, laboro), prikooperativajn afiŝojn, — senprokraste sendu al ni la samon pri viaj. Responde ni tuj sendos nian materialon.

2. Se vi sendos por nia **festo de Soveta Konstitucitago** (6. VII.) priskribon de vialanda konstitucio (de proleta vidpunkto), vi ricevos la samon pri nia.

Ambaŭ materialoj estos legataj en la festaj amaskunvenoj.

Ĉion adresu: **USSR, Samaro,** Rabоĉaja, 39, kv. 1, al **Jeleznjakov** Bazilo. (5583.)

Kooperativanoj

Okaze **de intern. koop. tago (6. VII.)** skribigu vian kooperativon aŭ vi mem skribu al ni pri stato, laboro de via kooperativo, sendu ekspoziciaĵojn por nia koop. ekspoz. Responde vi ricevos la samon (jam estas preta).

Adresu: **USSR, Samaro,** Raboĉaja, 39, kv. 1, al **Jeleznjakov** Bazilo. (5583.)

Klubo de sindikato de komerc- kaj sovetŝtataj oficistoj serĉas por konstanta korespondado klubon aŭ profesiorganizon el ĉl., L, PK, PI, bfl., gaz. Adr.: USSR, **Sverdlovsk,** Klubo de Sovtorgslujaŝĉiĥ "Profintern".

ENHAVO:

pаĝo
La filozofio de l' marksismo . . 369—370
La brita ministo kaj lia mondo . 370—371
Franca Sudano 371
Por nia distro 371
El Usono 372
Plifirmiĝo de l' faŝista reĝimo en Polio 372—373
La morto de la virgulino . . . 372—373
Paĝo el infana vivo 373
La Poeto proleta 373
Diskutejo 374
Kia devas esti mia edzino? 374
Sennaciula Sporta Paĝo 375
Tra Esperantio . . . . 376—380
Korespondado, Anoncoj 380

Presejo: Peuvag, Druckerei-Filiale Leipzig (Germanio)